REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

movada revuo en kunlaboro kun REU *№ 1 (62) februaro 2011*

en la numero

Zamenhof-festoj en Jekaterinburg, Moskvo, Sankt-Peterburg, Uljanovsk kaj leteroj al Zamenhof
invitoj al RET-2011, EsPrimo-7, REK-27
intervjuo kun eksprezidanto de REU
"Bulteno de REU", novaĵoj kaj multo alia

Moskvo, 2011

enhavo

01 RET-2011
03 Zamenhof-celebrado en Jekaterinburg
04 Pri la konkursoj, dediĉitaj al Zamenhof-tago 2010
06 "Letero al Zamenhof" de J.Zajdman
07 "Letero al Zamenhof" de L.Carol
08 "Letero al Zamenhof" de V.Laptev
09 "Letero al Zamenhof" de P.Dufeu
10 Zamenhof-tago en Peterburg
11 Germana ambasadoro gastis en "Lev Tolstoj"
11 "Zamenhof-tage" (robajoj de K.Ilutoviĉ)
12 Premiero en Uljanovsk
14 Ree en Toboljsk (EsPrimo-7)
16 Dufoja naskiĝo de abio
18 Prefiksaj E-vortoj mankaj en la rusa lingvo
24 Semajno de Internacia Amikeco reviviĝos
25 La 27-a Rusia Esperantista Kongreso
26 Danko al la ŝakklubo el la urbo Ardatov
26 Intervjuoj kun eksprezidantoj de REU
28 Pri Erasmo en la maja Malferma tago
29 Nova pledo de UEA ĉe UNo
29 Forpasis Vladimir Edelŝtejn
30 REU-premio en 2010
30 REU-membroj por 2011
33 Kotizoj de REU/REJM por 2011
34 PIV en la reto
35 Aperis la unua "Kontakto" kun radikale nova vizaĝo
35 Esperanto-libroj al naŭ bibliotekoj
35 Sekcio "Konsultejo" de la Akademio de Esperanto
36 De Zamenhof al Soros en Novjorko
37 11 esperantistoj reprezentas UEA ĉe UNo
37 IJK en 2012 okazos en Japanio
38 Vitalij Bianki (biografia skizo)
39 E-tradukoj de rakontoj de V.Bianki
44 Forpasis Danielo Kolker
45 Literatura konkurso Liro-2010
45 Internacia Esperanta Literatura Konkurso
46 Germania turneo de Mikaelo Bronŝtejn
55 Pri kanto de M.Povorin "Skarabo sur sablo"
56 La krasnodaraj esperantistoj salutas
k3 Jubileaj datoj de la jaro 2011

REGo

(Rusia Esperanto-Gazeto)

№ 1 (62) februaro 2011

aperadas ekde 2000

redaktas **Garik Kokolija**
kunredaktas **Viktor Aroloviĉ**
kunlaboras **Maksim Griŝin**

materialoj de REGo povas esti represataj, kondiĉe ke la tekstoj restos senŝanĝaj kaj estos indikita la fonto

poŝta adreso: Pjatnickoje ŝosse 45 – 105
125310 Moskvo, Rusio
retadreso: <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2011:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 450 rubloj sendendaj al:
Коколия Георгий Владимирович
Пятницкое шоссе 45 – 105
125310 Москва
por loĝantoj de aliaj landoj – 25 eŭroj pagendaj al la konto ***kklg-r*** *ĉe UEA*

elektronika abono *– 200 rub. (5 eŭroj)*

RET-2011: *Rusiaj Esperanto-Tagoj*

E-kluboj de Krasnodar, Soĉi kaj Gelenĝik, helpataj de Rusia Esperantista Unio, invitas vin partopreni en RET-2011 – **la unua RET ĉe Nigra Maro!**

RET okazos post kvarjara paŭzo, kiam la iamaj tradicioj de la aranĝo iom forgesiĝis. Tamen la organizantoj kredas, ke la rusia E-movado daŭre bezonas tian renkontiĝon kaj invitas ĉiujn, kiuj pensas same, aliĝi.

RET estos:

– **feriejo**: ĝi okazos marborde, proksime de unu el la plej popularaj ripozlokoj de Rusio, la urbo Gelenĝik;

– **edukejo**: ni instruos unu al la alia. Komencantoj povos studi la bazojn de la lingvo, progresantoj ricevos la lingvan praktikon, spertuloj povos plispertiĝi dum prelegoj kaj metiejoj, ni ankaŭ havos ekskursojn al vidindaĵoj kaj allogaĵoj;

– **artejo**: okazos koncertoj kaj prezentadoj.

Loko: la turisma bazejo "Kristall" (пансионат «Кристалл») en la loĝloko Betta, 40-kilometrojn sude de Gelenĝik. La bazejo situas tuj apud la marbordo, je kelkminuta piedira distanco de bonega plaĝo.

Datoj: 08-18 de aŭgusto 2011.

Kondiĉoj: la bazejo "Kristall" havas unu ĉefan loĝkonstruaĵon kun klimatizitaj ĉambroj kaj t.n. somerajn dometojn (sen klimatizo). Tendumado kaj surplanka loĝado estas mendeblaj en proksima kampadejo (je 800 m for).

La kostoj:

– 500 rub. tage por unu loko **en someraj dometoj**, 3-4 litaj ĉambroj (aldona lito en la ĉambro – 400 rub. tage);

– 1200 rub. tage por unu loko **en klimatizitaj ĉambroj**, 2-4 litaj ĉambroj (aldona lito – 800 rub. tage);

– 150 rub. tage por unu tendumanto **en la kampadejo**.

La prezoj validas, se oni mendas loĝadon por ne malpli ol 3 tagoj. Por malpli longa tempo la bazejo postulas je 30% pli.

Kaj, kompreneble, ĉe privatuloj en la loĝloko Betta oni povas memstare lui domojn, loĝejojn, ĉambrojn kaj litlokojn kontraŭ plej variaj prezoj.

La **manĝado** kostas 400 rub. tage kaj laŭ la nuna interkonsento estas ***nepra*** por ĉiuj partoprenontoj, i.a. tiuj, kiuj loĝos ekster "Kristall".

Atenton! Por rezervi la lokojn en la bazejo "Kristall" necesas sendi al la organizantoj antaŭpagon egalan al kosto de unutaga restado (loĝado+nutrado) antaŭ la 1-a de aprilo 2011. Konkrete: 900 rub. por loĝado en someraj dometoj, 1600 rub. por loĝado en klimatizitaj ĉambroj. La antaŭpago ne estas repagebla.

Aliĝkotizoj: Ĝis 01.04.2011 – 450 rub.
Ĝis 01.06.2011 – 550 rub.
Post 01.06.2011 kaj surloke – 650 rub.

Rabatoj: membroj de REU – 50 rub.; infanoj (aliĝintaj kun la gepatroj) – senpage.

Kontribuantoj al la programo, instruistoj de kursoj por komencantoj kaj progresantoj ricevos aldonajn rabatojn laŭinterkonsente kun la organiza teamo.

Krompago: aliĝantoj, kiuj tute ne posedas Esperanton (ne kalkulante infanojn) krompagas "instruadan kotizon" – 300 rub. La pago estos repagita kaze de regula kaj rezultodona partoprenado en lingvaj kursoj.
La aliĝkotizojn preferinde sendu anticipe – por helpi al la organizantoj. Atentu, ke pagado de la aliĝkotizo ne egalas al antaŭpagado por loĝado+manĝado kaj ne garantias ilin!

Allogaĵoj: La tendaro okazos en turisme riĉega regiono. Krom partopreni en la tendara programo kaj naĝi en la maro la partoprenontoj povos: viziti **delfinejojn** (en Gelenĝik kaj en Arĥipo-Osipovka, 40 km de Betta); ekskursi al **dolmenoj**; promeni per **ĉevaloj** en proksima montaro, ktp ktp ktp. En Gelenĝik estas granda **akvoparko** kaj tre popularaj **kablaj vojoj** al la alto de 600 m. Aliaj vizitindaj urboj troviĝas: Novorossijsk – ĉ. 80 km norde, Anapa – ĉ. 150 km norde, Soĉi – 230 km sude.

Atingado: per **aviadiloj** ĝis Krasnodar aŭ Gelenĝik, poste per busoj; aŭ **trajne** ĝis Krasnodar aŭ Novorossijsk, poste per busoj.

Organizantoj: dum la prepara periodo la organiza teamo konsistas el:
– Anatolij **Ivasenko** (Krasnodar) – kunordiganto de la organiza teamo, kasisto; +7-918-1704520, <krasnodaro@gmail.com> (ne retpoŝtu, se bezonatas urĝa respondo: A.Ivasenko ne havas komputilon!);
– Svetlana **Smetanina** (Moskvo) – preparado de vizoj por eksterlandanoj, oficialaj kontaktoj kaj kontraktoj; +7-926-6083244, <svsmetanina@yandex.ru>;
– Vladimir **Bespalov** (Soĉi) – kunordiganto de kunlaboro flanke de lokaj esperantistoj; <laro96@yandex.ru>;
– Andrej **Grigorjevskij** (Ŝumerlja) – informado, reklamo; <andreo@reu.ru>.

Aliĝu en <reu.ru> aŭ sendu kutiman aliĝilon (nomo, adreso, kontribuoj ks) al <ret2011@reu.ru>.

La kotizojn per poŝtmandato sendu al: Ивасенко Анатолий Иванович, а.я. 5, 350000 Краснодар (pri aliaj pagmanieroj interkonsentu kun Anatolij Ivasenko).
Eksterlandanoj, kiuj bezonas vizojn, kontaktiĝu pri la kotizopagado kun Svetlana Smetanina.

ZAMENHOF-CELEBRADO EN JEKATERINBURG

La 18-an de decembro 2010 en Jekaterinburg okazis la tradicia Zamenhof-festo organizita de la urba klubo "Arĝenta flamo".

Zamenhof-celebradoj en Jekaterinburg fariĝis tiom popularaj, ke ankaŭ multaj aliurbanoj ŝatas viziti ilin pro la interesa kultura kaj distra programoj. Ĉi-foje ankaŭ min tentis la ideo partopreni la eventon, kiu povas esti vera evento ebliganta ŝancon por vojaĝo al esperantista kunveno en la vintra sezono sojle de la forpasanta jaro. En ĉi tiu tago Jekaterinburg estis kovrita per densa neĝa tavolo kaj frostigita ĝis -27º, sed eĉ tiaj ekstreme severaj veterkondiĉoj ne embarasis alvenon de gastoj el 5 proksimaj kaj foraj lokoj de la urala regiono (Surgut, Tjumenj, Okunjovka de Tjumena regiono, Ĉeljabinsk, Niĵnij Tagil), ĉar la eksteran malvarmegon kaj surstratajn neĝamasojn videblajn ĉie tra la frosta nebuleto kompensis tre amika atmosfero en la konferenca salono de la hotelo "Granda Uralo".

La vespero havis atributojn de vera festo: interesa kaj bunta programo, emociaj kultureroj, amikaj revidiĝoj, etoso de kunestado en samlingva rondo. Jekaterinburgaj kaj tjumenaj esperantistoj prezentis retrospektivon de gravaj Esperanto-eventoj el 1910, reflektinte forgesitajn kaj nekonatajn al la nuntempa publiko okazintaĵojn el la antaŭcentjara periodo. Viktor Kudrjavcev, tre sukcese rolinta kiel Zamenhof en humura skeĉo, ricevis aplaŭdojn de la spektantoj. Ne malatentitaj estis ankaŭ malnovaj kaj ĵus eldonitaj Esperanto-libroj en la prezento de Aleksander Osincev, Rafija Kudrjavceva, Vladimir Opletajev, kolektintaj plurajn interesitojn ĉe la libroekspozicio. Aleksander vidigis kaj komentis interesajn fragmentojn el nova aŭtenta esperantlingva filmo.

Galina Terentjeva (Ĉeljabinsk) kaj Pavel Veselov (Tjumenj) okazigis skajprendevuon kun eksterlandaj esperantistoj, dum kiu Galina interparolis kun siaj geamikoj Betty Chatterjee (Danio), Victor Nino (Hispanio), Tsukuru Harada – Faro (Japanio), kaj ili de sur la granda ekrano salut-

ante el siaj foraj urboj gratulis la ĉeestantojn okaze de la festo. Por novaj esperantistoj tio iĝis elokventa pruvo de senbaraj kaj tute liberaj internaciaj komunikeblecoj pere de Esperanto.

La organiza teamo serĉante novan aliron al la festa tradicio enprogramigis du konkursojn ligitajn kun la nomo de la kreinto de Esperanto: leteron al Lazaro Ludoviko Zamenhof kaj fotokonkurson pri la temo "Zamenhof kaj mi". Kvankam la ideo celis literaturverke aktivigi unuavice uralajn kaj siberiajn esperantistojn, ĝiaj geografiaj kadroj tre baldaŭ larĝiĝis ĝis tre malproksime kaj trovis interesitojn en plej foraj lokoj. En la konkurso de leteroj partoprenis entute 33 personoj el 10 landoj. Ĉiuj konkursintoj ricevis belajn diplomojn, kaj al la ĉeestaj konkurspartoprenintoj ili estis solene enmanigitaj dum la vespero. Viglajn diskutojn kaj aplaŭdojn rikoltis ankaŭ la fotokonkurso al kiu per 42 originalaj fotoj kontribuis 20 esperantistoj el 8 landoj. La unuan lokon okupis Sergej Potaskujev el Niĵnij Tagil pro la fotomuntaĵo aludanta lian nespertecon de komencanto kuraĝe plonĝanta kaj naĝanta en la senlima oceano de Esperanto *(vidu la bildon en la unua kovrilpaĝo - La red.)*.

Fine mi ŝatus danki al ĉiuj organizintoj de la festo, pleje al Raja kaj Viktor Kudrjavcev, pro ampleksa kaj detala preparlaboro, kiuj garantiis senriproĉan programon, pro inventemo kaj malkovro de novaj ideoj, gastamo kaj nelacigebla entuziasmo. Mi dankas tiun ŝancon venigintan min en la vintran Jekaterinburgon por kuncelebri la 151-an naskiĝtagon de Ludoviko Zamenhof.

Vladimir Opletajev (Surgut)

PRI LA KONKURSOJ, DEDIĈITAJ AL ZAMENHOF-TAGO 2010

Estas agrable, ke en la maro de nia ĉiutageco okazas foje insuletoj de festoj, kien strebas animo por enspiri tie iom da freŝa aero de amika komunikado, reakiri vivĝojon kaj entuziasmon por plia aktivado.

Ĉiujare la tradicie okazantan Zamenhof-tagon en Jekaterinburg ni atendas kiel siaspecan E-feston, kiam eblas renkontiĝi kun E-amikoj, kiuj venas el proksimaj kaj foraj urboj de nia Urala regiono. Kiel organizantoj de tiu ĉi festo ni anticipe komencas zorge prepari ĝin, detale pridiskutante la programon, penante fari ĝin alloga kaj utila kaj eviti la ripetiĝojn.

Ankaŭ la preparadon de Z-festo en 2010 ni komencis longe antaŭ la evento mem. Ĉi-foje nin kaptis la nova ideo: lanĉi du kreajn konkursojn, ligitajn al la persono de la aŭtoro de Esperanto:

1) Konkurso de

leteroj al Ludoviko Zamenhof;

2) Fotokonkurso “Zamenhof kaj mi”.

Al la partopreno en la konkursoj ni invitis ne nur uralajn esperantistojn, sed aperigis la informon en la landaj retaj dissendolistoj <reu-agado> kaj <esperanto-rus-informoj> kaj tre ekĝojis, kiam rapidege ricevis la unuan reeĥon de la konata al ĉiuj Viktoro Aroloviĉ, kiu sendis bonegan foton por la fotokonkurso (*vidu la foton en la p. 27 – La red.*). Jam pli kuraĝe ni diskonigis la informon rete tra la mondo, kaj rapide niaj konkursoj iĝis internaciaj, ja reeĥis kaj ekdeziris partopreni samideanoj el multaj landoj. Kore ni dankas ĉiujn, kiuj subtenis la ideon per interesaj kaj tre sinceraj kontribuaĵoj!

Por la konkurso de leteroj entute venis el 10 landoj 33 leteroj, adresitaj al Ludoviko Zamenhof. Evidentiĝis, ke ĉiu aŭtoro havis ion propran por skribi, rakonti, komuniki al la aŭtoro de Esperanto, tial la temoj de la leteroj estis tre variaj: dankaj vortoj kaj respektesprimo al Zamenhof; Esperanto kaj ĝia rolo en la nuna mondo; esperantistiĝo kaj avantaĝoj de Esperanto; la historia vojo de Esperanto; tutmondaj kaj lingvaj problemoj; Esperanto kaj Esperanto-literaturo; konsilo al Zamenhof ne krei utopian lingvon kaj konfesoj de ordinaraj esperantistoj; movadaj kaj lingvaj temoj k.t.p. Same diversaj estis la formoj kaj ĝenroj, en kiuj estis verkitaj la leteroj: salutmesaĝoj kaj preĝo al Zamenhof; personaj rememoroj kaj meditoj, ligitaj al Esperanto; invito viziti la urbon kaj konsiloj al Ludoviko; rakontoj, noveloj kaj poemoj; fikciaj leteroj k.t.p.

Rimarkindas, ke kelkaj aŭtoroj trovis en la konkurso grandan kampon por la kreado, por la fantazio, ili mirigis kaj ĝojigis per sia neordinara krea aliro. Mi mem plezure legis ĉiujn leterojn kaj aparte ĝuis la leterojn kun neordinaraj aŭtoraj ideoj; ekzemple Luiza Carol el Israelo skribis al Ludoviko la leteron en la nomo de lia filino Lidia kaj Jefim Zajdman el Jalta – en la nomo de Borovko.

Ankaŭ por la fotokonkurso “Zamenhof kaj mi” partoprenintoj el diversaj lokoj de la mondo kontribuis per diversaj simpatiaj fotoj: seriozaj, ŝercaj, fantaziplenaj. Elektinte el la ricevitaj fotoj la plej konvenajn, ni faris foto-albumon, fotojn el kiu sur la granda ekrano, akompane de muziko kaj E-kanto “Ho, mia kor’” povis vidi ĉiuj partoprenintoj de Zamenhof-festo-2010 en Jekaterinburg. Oni ankaŭ voĉlegis kelkajn plej interesajn leterojn, adresitajn al Ludoviko Zamenhof. Al la gajnintoj de la unuaj 3 lokoj en la konkursoj ni sendis libropremiojn kun memoraĵoj el Jekaterinburg, kaj al multaj partoprenintoj de la leter-konkurso estis senditaj diplomoj pro la aktiva subteno de la iniciato.

Same kiel ĉiuj antaŭaj Z-festoj en nia urbo, ankaŭ tiu ĉi pasis tre rapide, restis por ni nur varmaj rememoroj pri ĝi. Sed feliĉe, ĉi-foje restis ankaŭ la porkonkursaj kontribuaĵoj, kiujn ni klopodis disloki sur la paĝoj de nia regiona E-retejo. Nun ĉiu deziranto povas vidi, tralegi, ĝui ilin! Bonvolu viziti nian regionan E-paĝaron laŭ subaj ligiloj: <http://www.ural-sib.org/eo/konkursoj/fotokonkurso-zamenhof-kaj-mi/fotokonkurso-zamenhof-kaj-mi> kaj <http://www.ural-sib.org/eo/konkursoj/konkurso-letero-al-ludoviko-zamenhof/konkurso-letero-al-ludoviko-zamenhof >. Kelkajn interesajn leterojn vi povas legi ĉi-sube.

Raja Kudrjavceva (Jekaterinburg)

Jefim Zajdman (Ukrainio)

De kiu: Nikolaj Borovko

Al kiu: L. Zamenhof
Dato:
Temo: **GRATULO kaj rememoroj**

Kara Majstro!
Mi estas feliĉa gratuli vin okaze de la naskiĝtago!
Pasis jam 115 jaroj post kiam mi skribis al Vi, petante rakonti pri deveno de Esperanto. Nun mian nomon esperantistoj scias precipe nur dank' al via respondo. Kion fari? La tempo forgesigas multon.
Ĉu vi memoras, kiel en 1887 vi ricevis leteron de 15-jara knabino Tonjo Ĉajkovskaja, kiu skribis: "Ni ne atendu, kiam milionoj da homoj decidos eklerni Esperanton, sed ekagu nun. Mi jam ellernis vian lingvon kaj instruas ĝin al la amikoj". Kiel vi scias, Esperanto interkonatigis kaj geedzigis nin.
Mi rememoras la malfacilan tempon, kiam multajn spertajn esperantistojn infektis la reformemo. Eĉ Antoni Grabowski estis inter tiuj. Por batali kontraŭ la reformistoj mi kun Antonina dissendis tiam (ŝajnas en 1894) centojn da leteroj, proponinte organizi balotadon ĉi-rilate. Kaj ni venkis!
Vi scias, ke en 1902-1906 mi loĝis en Jalta, kie ekde 1892 aktivis nia fama d-ro Ilja Ostrovskij. Mi tiam fondis urban publikan bibliotekon kaj estis ĝia unua direktoro. Antaŭ la dua mondmilito mi hazarde eksciis, ke iu familio loĝas en iama ejo de simferopola biblioteko, kies direktoro estis mia Antonina. Mi ĝisatendis, kiam en tiu familio aperis novnaskito, kaj tuj enkarniĝis. Kaj ĝis nun mi estas spirite ligita kun li – nuna gvidanto de jalta E-klubo. Liaj klubanoj kvazaŭ sentas tion, ŝercante, ke en lin enkarniĝis Borovko.
Vi certe memoras, ke en 1891 en "La esperantisto" aperis mia artikolo pri valoro de E-teatro (vi subtenis tiun ideon). Mi volas ĝojigi vin: en Jalta nun funkcias E-teatro "Improvizo", kiu prezentas spektaklojn laŭ rakontoj de Anton Ĉeĥov en E-festivaloj kaj renkontiĝoj enlande kaj eksterlande. Mi fieras, ke la teatro aperis ĝuste en Jalta.
Mi komprenas, ke miloj da gratulleteroj nun venas al vi. Tial mi ne plu volas ŝteli vian tempon per la rememoroj.
Estu trankvila, ke la afero, al kiu dediĉis sian talenton kaj energion tiom da neordinaraj homoj, neniam estingiĝos. Kiel oni diras: Esperanto ne mortos dum sur la tero restos almenaŭ unu esperantisto. Ja la Spirito renaskos ĝin!

Sincere – via N.B.
(mi esperas, ke vi memoras mian iaman literaturan pseŭdonomon)

P.S. En la Internacia E-muzeo en Vieno oni trovis surbrete iun malnovan grandegan manuskripton. Evidentiĝis, ke la aŭtoro estas nia glora pastro Ivan Ŝirjaev. La muzeo eldonis ĝin, la unuan originalan romanon en Esperanto. Mi tralegis ĝin kun

granda intereso.

P.P.S. Ho, mi forgesis. La muzeo ankaŭ eldonis libreton de malnovaj rakontoj sub la titolo "En la tombo". Mi rememorigas – estis tia mia rakonto en "La esperantisto". Kaj en la antaŭparolo la direktoro de la muzeo skribas, ke mi fakte estis "patro" de la originalaj noveloj. En la "Enciklopedio de Esperanto" estas nenio pri la noveloj, nek pri mia estado en Jalta. Kiel oni diras: manuskriptoj ne brulas.

* * *

Luiza Carol (Israelo)

Forbruligota letero

(fikcio)

Varsovio, la 15-an de decembro 1917

Kara Paĉjo,

hodiaŭ la unuan fojon okazas via naskiĝtago sen via ĉeesto. Se vi plu vivus ĉi tie, mi preparus por vi etan surprizan donacon kune kun danka bondezirkarto. Sed vi loĝas nun en la transmondo. Tuj post kiam mi finos tiun ĉi leteron, mi forĵetos ĝin en la fajron de la kameno, por ke ĝi aliformiĝu en fumon. Mi esperas, ke tiel miaj pensoj atingos vin en la nevidebla mondo de spiritoj, pri kiu foje babilis kelkaj el viaj gastoj.

Jen mi tajpas tiujn ĉi vortojn per via malnova tajpilo, kiun vi tiom amis. Ekde longe mi kutimiĝis ekdormi ĉiuvespere, aŭskultante la ritmon de via tajpado. Nun mankas al mi tiu kara lulkanto. Ĉu ĝi ne mankas al vi tie, kien vi transloĝiĝis? Ĉu vi rememoras, Paĉjo, kiom fiera mi estis, kiam vi la unuan fojon permesis al mi tajpi? Kaj ĉu vi rememoras ke, ĝis antaŭ kelkaj jaroj, mi veturigadis miajn pupojn per la kovrilo de tiu ĉi tajpilo? Ĝuste en tiu kovrilo Panjo trovis antaŭ nelonge la lastajn paĝojn, kiujn vi tajpis. Temis pri eseo ankoraŭ nefinita, kiun ni legis kvazaŭ ĝi estus via adiaŭa letero. Mi neniam forgesos la konfeson, kiun vi faris tie: "Mi eksentis, ke eble morto ne estas malapero...; ke ekzistas iaj leĝoj en la naturo...; ke io min gardas al alta celo...".

Mi ĉiam rememoros tion, Paĉjo. Vi ne malaperis. Via vivo estos por mi modelo kaj inspiro. Mi promesas, ke mi ĉiam pluiros sur via bela vojo, por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj.

Ĝojan naskiĝtagon, Paĉjo!

Tutkore brakumas vin, via amanta filino,

Lidia *

** Lidia ZAMENHOF (1904 – 1942) estis la plej juna filino de Ludoviko Zamenhof. Je la morto de sia patro en aprilo 1917 ŝi estis 13-jara. Ĝis la fino de sia vivo, Lidia verkis, tradukis kaj instruis pri Esperanto kaj bahaismo. Ŝi estis murdita en la nazia ekstermejo de Treblinka. Ŝia kompleta originala verkaro "Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj" estis eldonita de Flandra Esperanto-Ligo en 2009.*

Viktor Laptev (Rusio)

Renkonte Ludovikon

Se strebos al pasinto vi dum la mediumado –
subtila mondo gvidos vin laŭ dezirata pado.
Sur tiu pad' la Majstron mem renkontis mi,
Li ekdemandis min pri evolu-lini'
de Esperanto kaj movad' esperantista.
Konfesis mi, ke multaj ŝovinistoj
kun -intaj, -antaj, -ontaj naciistoj
klopodas en subten' de opinio,
ke de neŭtrala lingvo ja util' nenia.
Kaj same ŝtatsalajraj fi-lingvistoj
neglektas Esperanton, kontraŭ ĝi persistas.
De Antarktio ĝis polus' Arktika
en mondo regas Granda politiko.
La registaroj, kaj eĉ prezidentoj
ne kontraŭstaras ĉiuflankan interventon.
Pli suba grava ŝtata personaro
nur dancas sub akord' de ĉi gitaro,
ĉar bone scias koruptema gento
de kie nun ekblovas vento.
Manifestiĝas nur persona intereso,
profito kaj riĉeco havas pezon.
Popolamas' ne serĉas harmonion –
preferas proletar' kakofonion,
bieron, brandon, narkotaĵon...
kaj blasfemadon multetaĝan.
Pri tiuj faktoj, ŝajne, vi ne miras
kaj eble vi pri l' temo ion diros.
Ĉu ne ekzistas ankaŭ lingv-problemo
en Paradiz', Infer' kaj en Edeno?
– "Sur la terglob' Edenon mi ne trovis,
ĵargon' infera min ne preterblovis,
en Paradizo vere mankas la problem'
parol' senvorta fluas el animo mem!"
Kaj fine ekridetis kara Ludoviko:
– "Asert' pri malnatura lingvo – pura retoriko,
ja Esperanto pruvis sian jam efikon
por diversflanka interkomuniko.
Ne vane ĝin fidel-esperantistoj
subtenas ambaŭmane kaj insiste,
kaj ŝatas kanton pri agado por ĉiam'
ĉar estas ĝi esper' kaj nia am'!"

Patrice Dufeu (Francio)

Savbuo al la maro

Kara Ludoviko,
Okaze de via naskiĝtago, mi deziras rakonti al vi tion, kion mi ŝuldas al vi – kiel Esperanto iĝis mia "savbuo".
Same kiel Jodie Foster en la filmo "Kontakto", sed longan tempon antaŭ ŝi, jam de mia frua junaĝo, mi ĉiam atendis iun "kontakton", kiu de fore venus. Mi turmentis miajn gepatrojn por ke ili aĉetu al mi kurtondan radioaparaton por povi aŭskulti la universon. Sed tion ili ne faris; tiam mi komencis memfari elektronikajn aparatojn kaj starigi antenojn en la familia ĝardeno. Mi ne plu memoras en kiu lingvo mi imagis ke la universo parolos al mi, sed mi atendis...
Mi kreskis, kaj mi reduktis la kampon de la tuta universo al pli modesta dimensio de nia planedo. Nur post longa tempo, kiam Miĉel Berger – fama franca kantisto – verkis jenan kanzonon, mi komprenis tion, kion mi atendis:

"Ĉi tiu (ulo) pasigas siajn noktojn
Rigardante la stelojn
Pensante ke ie en la mondo
Iu pensas pri li".

Tial, paralele kun mia pasio pri elektroniko kaj komunikiloj, mi devis scipovi kompreni multajn lingvojn, por esti preta kiam venos la mesaĝo. Mi lernis la anglan lingvon, la germanan, la hispanan. Konfuze mi ja sentis ke mi ne estas preta; neniam mi kapablos perfekte paroli tiujn lingvojn: tro da malfacilaĵoj, tro da neregulaj verboj, tro da idiotismoj. Kiam mi enamiĝis al Portugalio, tiam la portugala lingvo mortigis mian revon. Mi pasigis febrece la tutan antaŭan jaron en libroj, vortaroj kaj instruiloj por lerni rudimentojn de tiu lingvo kaj kredis min preta vojaĝi tien por la venonta somero. Kaj kiam, fine kaj plezure, mi reiris en tiun amatan landon kaj ekprovis miajn talentojn, je mia granda surprizo kaj eĉ pli granda elreviĝo, neniu komprenis min; eble estis malbonega mia prononco. Parolante, mi forgesis la formojn de la neregulaj verboj kaj finfine (honto sur min!) la homoj alparolis min en la franca aŭ la angla lingvo...
Mi estis humiligita, senkuraĝigita: mi ĉiam estos fremdulo, enmigrinto, kiun ajn lingvon mi studos.
Kaj tiun tagon sendube via spirito, kara Ludoviko, ŝvebis super mia kapo: mi turnis la lernolibron per kiu mi lernis la portugalan; dorse de tiu libro kuŝis reklamo por "Esperanto sen peno". Mi rememoris, ke maljuna amiko de nia familio, samgeneracia kun miaj geavoj, parolis tiun strangan lingvon. Tiam, angul-okule, mi komencis rigardi pri kio temas. Kaj mi enamiĝis al la lingvo! Nur post unu jaro mi jam akiris nivelon pli bonan, ol mi havis post multajaraj penoj, dediĉitaj por studado de la angla aŭ la germana lingvo.
Kaj nun, nenie en Esperantujo mi estas fremdulo aŭ enmigrinto. Neniu idiotismo,

unu sola idiomo. Ni ĉiuj parolas la saman lingvon. Nun Universo povas alparoli min, mi estas tute preta: mi parolas la Univers[al]an lingvon!
Kara Ludoviko, vi estas parto de tiu granda kaj eterna Universo, kaj sendube vi ĝojas, ke tiom da dronuloj (simile al mi) kapablis trovi sian savbuon.
La dronulo, kio mi estis, dankas vin pro tio kaj kore salutas vin!

ZAMENHOF-TAGO EN PETERBURG

Ĉiujare, decembre, ni rememoras la kreinton de Esperanto L.Zamenhof. Denove figuro de la granda homo ekstaras antaŭ ni. Ĉu lia revo vivas? Ĉu homoj en la mondo volas kompreni unu la alian? Ĉi iu interesiĝas pri Esperanto? Jes! Jes! Jes! Kun la sama sento ni, peterburgaj geesperantistoj, lasis Petro-Paŭlan fortikaĵon, kie ni kolektiĝis por festi Zamenhof-tagon. La festo estis organizita de la peterburga klubo "Kariljono".

Komence ni aŭskultis, kiel belga esperantisto Jo Haazen ludis la Esperantan himnon kaj aliajn melodiojn per Granda Kariljono. Tre bele! Ni provis kanti kune, malgraŭ ke la vetero estis malvarma, kriis "Vivu Esperanto!", "Brave!", "Dankon!" kaj aplaŭdis. Post malgranda koncerto Jo Haazen salutis nin de la sonorileja alto.

Por vesperfino ni ĉiuj estis invititaj en la kafejon "Natura", kiu ankaŭ troviĝas sur la teritorio de Petro-Paŭla fortikaĵo. En la kafejo ni estis regalitaj per bona manĝo en rusa stilo: barĉo kaj blinoj. Krome, ni aŭskultis Esperantajn versaĵojn, plenumitajn de Jo Haazen (denove dankon al li!) kaj tre bonan ludon de la ensemblo "Blua ponto". Mi auskultis ĝin unuafoje kaj ricevis grandan plezuron. Ili ludis kantojn de diversaj popoloj. Esperanta kantistino L.Titova plenumis belan kanton sole. Dankon al ĉiuj, kiu partoprenis tiun ĉi bonan koncerton!

La ĉefa impreso de la festo estas sento ke ni, geesperantistoj, estas multnombraj kaj reale estas samideanoj.

Jekaterina Maliŝeva (Sankt-Peterburg)
foto de Natalja Celaritskaja

GERMANA AMBASADORO GASTIS EN "LEV TOLSTOJ"

La 20-an de decembro kunveno de la moskva E-klubo "Lev Tolstoj" estis dediĉita al celebrado de la pasinta Zamenhof-tago kaj la venonta Novjaro. La klubejo estis feste ornamita. Ĉeestis ĉ. 25-30 personoj.

Komence oni per minuto da silento omaĝis memoron de la antaŭnelonge forpasinta Vladimir Aleksandroviĉ Edelŝtejn.

Gennadij Ŝilo prezentis la honoran gaston – ambasadoron de Germanio en Rusio s-ron Ulrich Brandenburg, denaskan e-iston, iaman aktivulon de TEJO. S-ro Brandenburg iom rakontis pri si.

Nikolao Gudskov interese prelegis pri diversaj formoj de persona kaj familia nomo de L.Zamenhof. Aleksandr Ŝevĉenko prezentis librojn, eldonitajn de "Impeto" ĉijare. Mikaelo Povorin kantis kvin siajn kantojn, malnovajn kaj novajn. Poste Vladimir Merkulov kun pian-akompano de Irina Mironova kantis kelkajn klasikajn kantojn kaj romancojn, tradukitajn de Ljudmila Novikova.

Sekvis paŭzo por komuna teumado (por dezirantoj – ankaŭ vinumado: ĉampano kaj jam konata vino "Don Esperanto"). Abundis fruktoj kaj dolĉaĵoj, i.a. germana festa kuko, donacita de la ambasadoro. Post la paŭzo okazis negranda koncerto de Maŝa Koĉetkova – ŝi kantis kantojn proprajn kaj ankaŭ tiujn de Andrej Obrezkov kaj Ĵomart Amzeev. Finis la programon aŭkcio, kiun kiel kutime gvidis Garik Kokolija. Estis venditaj dudeko da malnovaj, sufiĉe valoraj E-libroj, ankaŭ E-temaj bildkartoj kaj insignoj.

Kelkajn fotojn, faritajn de Roman Bolŝakov, oni povas vidi ĉe la retadreso <http://picasaweb.google.com/RBolsxakov/RenkontigxoEnLevTolstoj>.

La vespero finiĝis tre malfrue, post la 22-a horo.

Valentin Melnikov (Moskvo)

ZAMENHOF-TAGE

robajoj

Esperanto sen trudoj kaj premoj de bar'
Vivas por unuig' per la vorto kaj far'.
Kial do obstinuloj ne volas kompreni,
Ke ĝi estas amik' de la hom' kaj homar'?

Tretas plu Esperanton profano sen brid':
Estas ĝi homunkulo aŭ lingva perfid'!
Ĉu profano tutsimple ne povas ĝin lerni,
Kion li penas maski per mokoj kaj rid'?

Esperanton, la voĉon de l' vivharmoni',
Rompas krokodilar' per la lingva neni'.
Kion dirus la Majstro pri l' nuna movado?
Ĉu li estus dankema al multaj el ni?

Por esprimo de vervo, esper' kaj dolor'
Ne sufiĉas vortara diklibra trezor'.
Kiel sentojn vortumi pli bone, pli vive
En la lingvo de l' reve unika valor'?

Tamen oni aktivas, fervore, sen ĉes'.
Kaj atendas tendar', festivalo, kongres'.
Libroj venas plu, perfektigante la lingvon, –
Malaperu nur mokoj pri ĝi kaj forges'.

Persekutas ĉagrenoj, fiaskoj, dolor'.
Ĉio estas jam kontraŭ, nenio plu por.
Esperanton eklernu, komencu ĝin lerni –
Povas esti, revenos vivam' al la kor'.

Esperanto plu vivas en bril' de la vort'.
Sen esperantistar' ĝin forlasos la sort'.
Esperanto ne zorgas pri la fina venko –
Ni ĝin proksimigadu per penoj kaj fort'.

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

PREMIERO EN ULJANOVSK

La 19-an de decembro en Uljanovska Esperanto-klubo okazis longe atendita premiero. Oni surscenigis la teatraĵeton de Valentina Spicina (Volgograd) "Iomete pri Zamenhof". La teatraĵeto konsistis el du partoj: en la unua temis pri konatiĝo de 27-jara Ludoviko kun sia estonta edzino Klara. Sendube, vi divenis, ke tiuj gejunuloj estis la juna kuracisto Ludoviko Zamenhof kaj Klara Zilbernik. La premiero estis ja dediĉita al ili kaj ludita okaze de la naskiĝtago de Doktoro Esperanto. Ni scias, ke ilia unua renkontiĝo aspektis alimaniere. Tamen, ĝi povus esti tia.

La dua parto de la teatraĵeto montris revenon de Klara kaj ilia fileto Adamĉjo al la gepatra hejmo antaŭ translokiĝo de la familio al Ukrainio, kie intencis labori Ludoviko. Eble, ankaŭ tiu sceno ne veras. Sed nia scenaristino verkis ĉion por komencantoj, kaj vi scias jam, ke nia kluba teatra teamo nomiĝas "Eternaj komencantoj" (REGo, № 6 (61), p. 6).

parolas la kluba prezidanto

La aktoroj certe nervumis: nur Sergej Abramov, kiu ludis la ĉefan rolon, kaj Elmira Kuĉatova (Klara) trankvile sidis ĉe tablo, atendante la premieron. Aliaj aktoroj (niaj klubaninoj) febre ripetadis la tekston. Dum tiu tago la rolojn de jam ne tre juna Klara kaj de ŝia patrino ludis laŭvice tri teatraj trupoj: Ljubovj Zajceva kaj Fira Fajzraĥmanova, Galina Aleksejeva

kaj Raisa Vanjko, Tatjana Kuzjmina kaj Margarita Karceva. Ne gravas, ke ni havis kutimajn vestaĵojn. Ne gravas, ke nian spektaklon ĉeestis nur klubanoj. Gravas, ke ni ĉiuj finfine kuraĝis aperi sur improvizita scenejo kaj tre diligentis. Ĉiuj – tio inkludas ankaŭ niajn novulinojn Nadeĵda Saveljeva, Vera Trifonova kaj Vera Tepomes, kiuj lernas Esperanton ekde oktobro. Do, la premiero okazis! Kaj ni dankas Valentinan pro la ebleco variigi nian feston. Ni dankas ankaŭ nian junan amikinon Irina Pleŝakova, kiu la duan fojon desegnis por la klubo teatrajn programetojn kaj kies bildon (post ŝia reveno el Soĉi) vi povas trovi sur paĝo de nia kluba ĵurnalo "Verda Teo" № 4, 2010 ĉe <www.esperanto73. narod.ru>.

Ne nur premiero... Dum Zamenhof-festo (dum oficiala parto) ni resumis nian jaran agadon. Estis multo farita, kaj entute ni estas kontentaj. Malĝojigis nur manko de gejunuloj en la klubo. Tio estas klara, ĉar ili finas universitatojn kaj poste laboras en diversaj urboj de nia lando. Ni nur esperas, ke ili ne forgesos Esperanton kaj kunlaboros kun ni.

Poste Ljudmila Kuljbakova rakontis esperantlingve biografion de Doktoro Zamenhof. Sergej Abramov kaj Jelena Sirotinina laŭtlegis siajn leterojn al la Majstro, kiujn ili sendis laŭ peto de niaj geamikoj el Uralo por ilia konkurso dum Z-festo. Tiel etendiĝis fadenoj ne nur al Volgograd, sed ankaŭ al Jekaterinburg.

Ljudmila Kuljbakova rakontas pri L.Zamenhof

Granda surprizo estis deklamo de la konata versaĵo "Ho, mia kor'". Tiun surprizon preparis por ni Vladislav Trofimov, kiu longe forestis en la klubo. Du Veraj (Trifonova kaj Tepomes) prezentis al ni versaĵojn de H.Heine, tradukitan de L.Zamenhof, kaj de M.Lermontov.

Fine ni spektis la filmon pri Esperanto, donacitan de Vladimir Bespalov dum TILE-6, kaj kantis multajn kantojn el kantareto de Tatjana Kuzjmina. Tradicia tetrinkado ne estis forgesita. Tamen krom la teo niaj virinoj ĝojigis nin per diversaj salatoj kaj esperantlingvaj receptoj – verŝajne, bone lerninte la temon "Manĝado" dum novembraj E-lecionoj.

Dankleterojn pro aktiva kluba agado ricevis dum la festo Sergej Abramov, Jurij Karcev, Tatjana Kuzjmina, Oljga Sirotinina kaj Galina Aleksejeva. Nomitaj estis gajnintoj de la kvizo pri Uljanovsk (aŭtoroj: M. kaj J. Karcev-oj). La kvizon partoprenis 13 uljanovskanoj kaj 4 volgogradanoj. Inter la uljanovskanoj gajnis Tatjana Kuzjmina, inter la volgogradanoj – Irina Birjukova.

La tradicia libroservo funkciis antaŭ la festo, precize la 15-an de decembro dum kutima leciono, kiam ni studis biografion de la Majstro. Popularaj estis vortaroj kaj kantaroj. Dum la festo estis prezentitaj novaj E-kalendaretoj, eldonitaj en Uljanovsk.

Margarita Karceva (Uljanovsk), fotoj de Raisa Vanjko kaj Margarita Karceva

REE EN TOBOLJSK

Esperantista printempo – EsPrimo-7

Iniciatintoj de la Ural-Siberia esperantista jarkunveno – partoprenintoj de la Zamenhof-festo 2010 en Jekaterinburg kaj kolektivo de la paĝaro "Ural-Siberia esperantista movado". Al EsPrimo-7 estas invitataj ĉiuj esperantistoj pretaj diversmaniere kontribui al la programo, dezirantaj aktivi por plialtigo de sia lingva kaj parola niveloj, ŝatantaj kontakti geamikojn kaj ĝui printempan etoson de la unua siberia ĉefurbo.

Organiza teamo:

1. Diljara Gadirova (Toboljsk) – enloĝigo, turista programo;
2. Rafija Kudrjavceva (Jekaterinburg), estrarano de REU – ĝenerala kunordigado;
3. Viktor Kudrjavcev (Jekaterinburg) – informado, programo;
4. Vladimir Opletajev (Surgut) – lingva, eduka programoj;
5. Aleksander Osincev (Jekaterinburg) – kultura, lingva programoj;
6. Arina Osipova (Jekaterinburg) – kultura programo;
7. Pavel Veselov (Tjumenj) – komputila servo, fotoservo, retligoj.

Dato de la renkontiĝo: 07-09.05.2011

Temo de EsPrimo-7: **Generacioj en la urala esperantista movado**

La diskuttemo estis kaj restas ĉiam aktuala dum la tuta historio de Esperanto, kaj la esperantista movado de Uralo ankaŭ ne estas escepta kaj devas respondi al multaj demandoj kaj defioj ligitaj kun la natura rotacio de la generacioj, ĉar aktivaj kaj agemaj esperantistoj de la SEJM-a kaj post-SEJM-a periodoj iom post iom fariĝas aĝuloj. Ili vidas sian apogon en la vicoj de pli junaj samideanoj. Sed ĉu ĉiam kongruas iliaj celoj kaj harmonias iliaj kontaktoj? Al ĉi tiu kaj pluraj aliaj demandoj oni serĉos respondojn dum la seminario kadre de la renkontiĝo.

Kiel kunvivas kaj kunagas esperantistoj de diversaj generacioj: junaj kaj maljunaj, spertaj kaj novaj? Ĉu estas konfliktoj kaj kontraŭstaroj inter la esperantistaj generacioj, kion ili atendas unu de la alia? Kial kaj kiel komencantoj adaptiĝu al la esperantista komunumo por trovi en ĝi sian propran agadkampon? Kial spertaj esperantistoj post kelkjara brila aktivado fariĝas por longa tempo inertaj kaj marĝenaj observantoj?

En la programo: diskutoj pri la ĉefa temo, lingvaj kaj kulturaj prelegoj, artaj kaj koncertaj vesperoj, aŭtoraj metiejoj, konkursoj, diverstemaj laborkunsidoj, lingvaj ludoj, lecionoj por novaj esperantistoj, ekskursoj kaj vizitoj al historiaj vidindaĵoj de Tobolsk.

Aliĝkotizo: pagendas dum la registriĝo en Toboljsk. Por laboruloj – 200 rub.; por infanoj, studentoj, pensiuloj – 100 rub.

Turisma programo:

Toboljsk apartenas al tiuj urboj, kies historio estas ligita kun la rusa ekspansio en Azio kaj konkero de grandegaj siberiaj kaj orientaj teritorioj ĝis la Pacifiko. Ĝi estas unika urbo akumulinta dum jarcentoj specifajn trajtojn kaj fleganta sian



originalan multafacetan kulturon.

La lasta brikŝtona kaj plej orienta kremlo de Rusio estis konstruita en Toboljsk en 1699 – 1717. La Kremlo vidiĝas nun majeste sur altega kruta bordo de la siberia riverego Irtiŝ kvazaŭ ĝi gardus per siaj blankaj muregoj kaj turoj la tutan senliman orientan parton de Rusio kaj benus ĝin per oraj kupoloj de kampaniloj kaj ortodoksaj katedraloj.

Toboljsk spertas nun apartan atenton kaj grandan financan apogon de la federacia kaj regiona registaroj kiel grava turisma centro. Multaj historiaj objektoj estas restaŭrataj, kaj la urbo povas prezenti al siaj scivolaj gastoj interesajn aŭtentajn vidindaĵojn. Inter ili estu aparte rimarkindaj kaj vizitindaj la historia Kremlo kun funkciantaj preĝejoj, seminariejo kaj regionografia muzeo; muzeo de la asimilado kaj studado de Siberio je la nomo de Dunin-Garkaviĉ, muzeo de la okcidentsiberia juĝsistemo, bildarta galerio, memortombejo kun la tomboj de ekzilitaj decembristoj partoprenintaj la kontraŭcaran ribelon en 1825, fama eburtajla metiejo, laborĉambro de la lasta rusa cara Nikolao la 2-a, kiun li disponis dum la restado de la Romanov-familio en la siberia ekzilo en 1918, interesaj monumentoj kaj diversekleziaj preĝejoj, ekz. la Preĝejo de Andreo Unuaapostola, en kiu oni adiaŭis V.Küchelbecker – amikon de A.Puŝkin.

Dum “EsPrimo-7” krom la ekskurso tra la urbo kun vizito de supremenciitaj vidindaj lokoj kaj muzeoj, laŭ deziroj de la partoprenontoj eblas ekskursi al la fama monaĥejo en la vilaĝo Abalak. Dezirantoj ankaŭ povos viziti varman fonton kaj bani sin tie (16 km for de la urbo).

La malnova rusa urbo atendas kaj deziras gastigi vin dum varmaj festaj tagoj en la rondo de uralaj kaj siberiaj esperantistoj. Bonvenon al Toboljsk!

Trafiko:

Toboljsk estas bone atingebla per trajnoj el la urboj de la Urala kaj Okcidentsiberia teritorioj: Permj, Jekaterinburg, Ĉeljabinsk, Tjumenj, Novosibirsk, Surgut. Inter Tjumenj (regiona centro) kaj Toboljsk funkcias vigla busa trafiko.

Loĝkondiĉoj:

Laŭ siaj financaj ebloj la partoprenontoj povos elekti el du variantoj:

1. Loĝado en la stacio de junaj turistoj, en la ĉambroj por 6-8 personoj, kontraŭ 220 rub. por diurno.

2. Unuloka ĉambro en la hotelo “Tobol” – 1200 rub. por diurno; duloka ĉambro en la sama hotelo – 1700 rub. por diurno.

Manĝado – en apuda manĝejo de la pedagogia altlernejo: matenmanĝo – 60-70 rub.; tagmanĝo – 100-120 rub.; vespermanĝo – 80-100 rub. Eblas memstare zorgi pri la manĝado (estas negranda kuirejo en la renkontejo mem, kie prepareblas io laŭ deziro).

Kontaktoj *(por ĉiu estas indikitaj la retadreso kaj telefonnumero):*

1. Diljara Gadirova <dilaratobolsk@rambler.ru>; (3456) 223335;
2. Raja kaj Viktor Kudrjavcev <komencanto@r66.ru>; (343) 3814250;
3. Vladimir Opletajev <surborde@mail.ru>; (3462) 258413 (post la 20-a horo);
4. Aleksander Osincev <alex.osintsev@googlemail.com>; (902) 2603613;
5. Arina Osipova <tigrrik@mail.ru>; (950) 5408152;
6. Pavel Veselov <pav.tmn@gmail.com>; (922) 4801151.

La Organiza teamo

DUFOJA NASKIĜO DE ABIO

Uljanovska E-klubo resumis la jaron 2010 per novjaraj festoj en sia urbo kaj en Dimitrovgrad. La fremdlingva fako de la regiona biblioteko – "nia domo" – translokiĝas, tial nia kluba festo estis tre modesta, tamen vigla. Inter jam pakitaj libroj kaj malplenaj librobretaroj ni organizis gajan novjaran diskotekon, kiun partoprenis fabelaj personoj Avo Frosto kaj... ne, tute ne Neĝulino, – Avino Jagino! Avo Frosto disdonis donacojn al ĉiuj, kiuj montris siajn E-sciojn, kantante, deklamante aŭ simple voĉlegante ion. Sed la ruza Avino Jagino sukcesis kaŝi saketon kun donacoj kaj kaŝi sin mem. Finfine ŝi estis trovita, kondukita al Amika Rondo, kaj post nelonga eduka procedo ŝi jam brave kantis duope kun gitaristo Vasilij Januŝevskij "Se vi ne ekzistus plu" kaj eĉ instruis dancadon. Vere, dancoj estis multaj kaj diversaj. Kune kaj sole. Ĉiujn impresis Katja Ĵuravljova per siaj graciaj movoj. Ĉiam, kiam en nia klubo aperas Vasilij (kaj ĉi-foje li estis kun sia amiko Andrej), ni kantas diverslingvajn kantojn. Kaj jen ni havis eĉ du gitaristojn kaj aŭskultis multajn belajn kantojn. Eĉ Avino Jagino estis kontenta, kvankam kutime estas malfacile komplezi al ŝi, ŝi tre ŝatas gitaran muzikon.

La dua parto de novjara festo – maskobalo – okazis en Dimitrovgrad, kien ni estis invititaj de tiea E-klubo "Verda suno" kaj ĝia prezidantino Tatjana Iljutkina. Ni ĝojis revidi niajn amikojn, kiuj aranĝis bonegan programon: malgrandan

amuzan koncerton, kiun partoprenis eĉ "gastoj" el Japanio (Margarita Karceva kaj Valentina Rjumina), el iu araba lando (Ljudmila Sedova), el Brazilo (Ljudmila Rogova kaj Vladimir Salamatin) kaj unu el ĉiopovaj gvidantoj de nekonata gento "mumbo-jumbo" (Ljudmila Sedova). Ĉeestis ankaŭ Sankta Klaus (Svetlana Logaĉeva), kiu proponis al ni surscenigon de "Dometo" laŭ moderna interpreto, kaj tio plezurigis ne nur spektantojn, sed ankaŭ "aktorojn": Raisa Vanjko (Kulo), Margarita Karceva (Muŝo), Marina Jusupova (Muso), Galina Izmajlova (Vulpo), Vladimir Salamatin (Lupo) kaj Aleksandr Ĥrustaljov (Urso). Spite al fabela enhavo la Urso konstruis novan domon, kie ĉiuj bestoj ekloĝis konkorde.

Ankaŭ Avo Frosto (Vladimir Visotin) partoprenis la feston kaj brile plenumis per gitaro kelkajn kantojn. La trio "Senvoĉaj birdoj" (Tatjana Kuzjmina, Raisa Vanjko, Margarita Karceva) post premiero en Soĉi jam pli kuraĝe klarigis al ĉiuj, ke "iu amas gitariston". Kaj vere, ĉiuj ŝatas kaj amas nian gitariston Aleksandr Ĥrustaljov, kiu kune kun Tatjana Orjol ĝojigis nin dum tiu vespero per multaj E-lingvaj kantoj, kaj eĉ akompanis la aŭdacan trion. Aperis nova dueto (Marija Ĥafizova kaj Tatjana Kuzjmina). Cigana teamo sub gvido de cigana barono (Ljudmila Sedova) post plenumo de "Nigraj okuloj" instigis ĉiujn al "Ciganino". Vintrajn E-versaĵetojn deklamis Ljudmila Kuljbakova kaj Jelena Sirotinina. "Eternaj komencantoj" ne restis flanke. Unuafoje en Dimitrovgrad ili surscenigis "Rapeton" (kvankam la teatra kolektivo estis alia ol en Soĉi).

Ankaŭ senmalgajna loterio, organizita de Tatjana Iljutkina kaj Tamara Kirik, amuzis la ĉeestantojn. Fine de la maskobalo oni ricevis ŝercajn premiojn pro la plej bonaj kostumoj. Teumado kaj komuna fotado estis inda finalo de la novjara festado, dum kies rondodancoj verda abio naskiĝis dufoje.

Adiaŭ, la pasinta jaro! Saluton, jaro de Kato kaj Kuniklo! Alportu al ni pacon kaj kvieton! Donacu al ni multajn renkontiĝojn kun geamikoj!

Margarita Karceva (Uljanovsk)
fotoj de Margarita Karceva, Tatjana Iljutkina kaj Raisa Vanjko

PREFIKSAJ E-VORTOJ MANKAJ EN LA RUSA LINGVO

parto 2 [1]

Prefikso DIS-

Estis inspirige vidi tiom da gejunuloj kiuj kontraŭas kapitalismon kaj ke finfine la tuta maldekstrularo kunvenas. KKE (grekaj komunistoj) i.a. disdonis folietojn, kiuj multon eksplikas, ekz. kial oni **dismembrigis** Jugoslavion.
Anne Johnson, or., Svedio, Heroldo de Esperanto, 2001, 10, p. 1

La konata projekto "Indiĝenaj dialogoj" estis **dismontrita** per okulfrapa afiŝ-prezento.
Stefan MacGill, or., Nov Zelando – Hungario, Internacia Pedagogia Revuo, 2001, 2, p. 22

La ŝnuroj siaflanke, estis en plimulto malnovaj, ekŝiritaj, plenaj je nodoj kaj maŝoj, kun finoj **disobliĝaj**.
Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroatia Prozo, Zagreb, 1979, p. 69

La ĉi-rilataj **disopinioj** ofte kaŭzis kaj ankaŭ hodiaŭ kaŭzas gravajn konfliktojn inter la 'pacemaj' samideanoj.
Ada Csiszár, or., Hungario, Literatura Foiro, 59 (febr. 1980), p. 4

Li traktis min ne kiel **disopinian** personon, sed kiel ekstermindan beston...
Georgo Kamaĉo, or., Hispanio, Survoje, 15 (jul-aŭg. 1993), p. 16

Pri la fakto ke temas pri kristnaskaj kantoj eblas **disopinii**.
Georgo Kamaĉo, or., Hispanio, Esperanto, 1992, 11, p. 193

... UEA havas estraron en kiu sep kapablaj homoj **disopinias** pri bazaj agadprincipoj.
Mark Fettes, or., Kanado, Esperanto, 1993, 6, p. 101

Li... turnis la kapon al ŝipfenestro tra kiu videblis Tero, – blua pilko **disornamita** per blankaj nubaĵoj kaj...
Jovan Zarkoviĉ, el la serba, D.Mikuliĉiĉ, "O" kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 38

Estis pri tio multa **disparolo**, kiom estis malkreskinta lia aroganteco, kaj multaj nun elmemoris malnovan proverbon, ke falon antaŭas fiero.
Baldur Ragnarson, el la islanda, Islandaj pravoĉoj, Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo, 1964, p. 44

... korpvarma litaĵo molaĉe-ĉifa vestoj **displanke** hasto malŝarĝa...
Gonçalo Neves, or., Hispanio, Literatura Foiro, 134 (dec. 1991), p. 19

... la produkton oni liveros el la fabriko... por ellasi nubon da **dispolva** pulvoro, el kiu la plej granda parto (oni esperas) enŝutiĝos en la cisternon (ĉi-foje ni transportos ian fosfo-ion al Belgujo, kie oni faros lesivon el ĝi).
K.Jakobo, or., La Gazeto, 78 (okt. 1998), p.26

Aldone, interna kovrilpaĝo disigas la kunaŭtorojn per la indiko: "lingve reverkita

[1] La unua parto aperis en REGo № 6 (61), 2010.

de Christian Declerck laŭ la orignalo de Derk Dorval". Mi do **dispriskribos** iliajn rolojn. Ni komencu per Dorvalo...
Georgo Kamaĉo, or., Hispanio, Esperanto, 1990, 4, p. 78

La posteuloj de la Salĵukidoj, la Osmanidoj okupis Bizancon en 1453 kaj **disprogresigis** la belan turkan civilizacion surbaze de la fundamentoj salĵukidaj.
La Gazeto, 28 (apr. 1990), p. 30

... juna knabino kun **disradia** ĝojo...
Eŭgene de Zilah, or., Hungario – Francio, La Gazeto, 5 (jun. 1986), p. 3

Dum la leciono la instruisto ne nur ĉesigas instrui portempe, sed eĉ iĝas ombro. Li nur silente ĉirkaŭiras **disrondete** sidantajn lernantojn kaj aŭsklultas ilian interparoladon.
Yenovk Lazion, or., La Ondo de Esperanto, 2003, 4, p. 7

Laŭ ĉi tiu regulo, la sekvantaj aferoj estas neetikaj: aer-, akvo-, kaj grundpoluo. Brupoluo, murskribaĉoj, kaj **disrubado**.
Maurice Wittenberg, or., Usono, La Ondo de Esperanto, 2002, 2, p. 11

Ĝian rekonstruadon ordonis Herodo, en la jaro 21; la starigo de ĝiaj portikoj postulis ok jarojn, kaj la planoj de tiu grandioza verko... estis elfinitaj nur nelonge antaŭ la momento de ĝia plena **disruiniĝo**.
L.C.Porto Karreiro Neto, el la portugala, Emanuelo, Antaŭ du mil jaroj, Federaçâo Espirita Braziliera, Brasil, 1993, p. 60

Kadre de la **Disseminario** ni ŝatus diskuti pri la sekvantaj temoj... [verŝajne temas pri disaj temoj de la seminario]
Eventoj, 1995, 1/okt., p. 4

Gilbert Ledon el Brazilo pretigis terminaron en Esperanto pri la temo. Claude Piron vaste **disskribis** pri la problemo. Kun ili kunlaboris multaj aliaj.
La Ondo de Esperanto, 2002, 8-9, p. 8

Dek miliardoj da lumjaroj! Jen la **disspaco** de la videbla universo.
or., Kroatio, Tragedio en la Universo, Zagreb, 1961, p. 13

... kiu ordonas al la floro aŭtune **dissemiĝi**...
Andy Künzli (Svisio), el la rusa, Literatura Foiro, 130 (apr. 1991), p. 39

Laborkomisionoj de internaciaj organizaĵoj (i.a. de UEA kaj ILEI) senvojaĝe kunsidas (ĉu ***dissidas***?) pere de retpoŝto.
Mauro La Torre, or., Italio, Esperanto, 1998, 6, p. 118

Li kaŝe foriris al la herbejoj kaj longe kontemplis el malantaŭ vepro kiel Fortulo klinas sian potencan kapon kaj kun firme **disstaraj** kruroj ĝue prisorbetas la matenan roson.
Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroatia Prozo, Zagreb, 1979, p. 318

Fojfoje dumnokte li spasmotremis dum koŝmaro el evitindaj sonĝoj, je kiuj li vidis la stacion eriĝe ŝirata de furioza forto, dum li tenis ĝin **maldise** per nudaj manoj, ligoliato **disstreĉa** pro doloro...
Jovan Zarkoviĉ, el la serba, D.Mikuliĉiĉ, "O" kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988,

p. 37-38.

Franĉjego levis la akordioniston supren kaj enportis lin en la gastejon: – Muziku, bandulo! **Disstreĉu** ĝian faŭkon! Hej, virinaĉoj...
Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroatia Prozo, Zagreb, 1979, p. 324

Li atendis tiun vokon kun stringitaj makzeloj kaj koro, timante ke kuglo aŭ kurento lin perfidu. Tiuj momentoj **disstreĉis** kaj la cerbon kaj ĉion, ĉar neniam eblas certi...
Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroatia Prozo, Zagreb, 1979, p. 547

Sinsekve (oni) malliberigis kaj kondamnis lin. Krome konfiskitaj estis ĉiuj liaj esperantaj libroj kaj eĉ korespondaĵoj, kaj ankaŭ eldonĉesigita la revuo "Korea Esperantisto". Tiel **disŝaŭmis** la afero.
La Espero el Koreio, 1992, 4 (109), p. 5-6

Nun devas interveni la dekestro, por ke ili pretigu bonan **distaskigon**: kvaropon ili difinis por gardostari – duopo por...
Branko Miljko, el la serba, Branko Ĉopiĉ, Legindaj partizanoj, Sarajevo, 1987, p. 44

Kaj post nelonge ili alvenis al vojforko, kie **distranĉiĝis** tri padoj.
Choe Tae-sok, el la korea, La Espero el Koreio, 1991, 2 (101), p. 17

... kaj due malprofundiĝado kaj naiveco de la temo mem. Ĉi tiuj difektoj **distruas** la tutan teksaĵon de nia frua poezio.
Norda Prismo, 1972, 1, p. 45

La plej granda danĝero por la esperanta frataro estus ia **distrudiĝo** de venenaj herbaĉoj ŝovinismaj, verdaĉe apartismaj.
Eŭgene de Zilah, or., Hungario – Francio, La Gazeto, 86 (jan. 2000), p. 4

... jes ja, la kostoj de plurlingveco – ni ĉiuj tion scias – estas altaj; sed ne tio bremsos la fariĝon de la Eŭropa mona Unio... Tamen por la esperantistoj certe pri gravas la "kultura kosto", de tiu **disUnio**. Kaj tio, kio plej gravas estas, ke se politikistoj zorgas pri la ekonomika Unio, male, la esperantistoj, nome la "ordinaraj homoj" zorgas pri la civitana Unio...
Marko Picasso, or., Heroldo de Esperanto, 1998, 1, p. 3

Kaj la tagmezo kaj la vespero kaj la noktomezo, kaj la vintro kaj la printempo kaj la somero kaj la aŭtuno, ĉio el ili **disvaporis** en iun malgajan unutonecon.
Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroatia Prozo, Zagreb, 1979, p. 41

Inter la du vojetoj verdas unu vasta piceo, sub kies **dise-vasta**j branĉoj staras du altaj tomboŝtonoj.
Norda Prismo, 1967, 2, p. 99

Ili ne povis ne kredi ke Ĉinio **disvenkis** la hunnojn kaj...
Miyamoto Masao, el la japana, Loulan, Japana E-Instituto, Tokio, 1984, p. 10

Sed la nokton **disvenkas**
kiu vivas de lumo,
do nure por mi
la tenebra kurteno
ekŝaltis la ĉielon...

Pier Giorgio Soranzo, or., Literatura Foiro, 120 (aŭg. 1989), p. 32

Viziton postulas ankaŭ multaj muzeoj, kelkaj unikaj, kiel la Muzeo de Diasporo, prezentanta la historion de dumil jaroj da juda **disvivado**.
Josef Ŝemer, or., Israelo, Esperanto, 2000, 2, p. 25

Iun tagon eble la infanoj nin ne atendos, mensediris Ivano. Ni **disvojos**. Ni revenos al Tero kaj ili ekflugos al alia ĉielflanko.
Jovan Zarkoviĉ, el la serba, D.Mikuliĉiĉ, "O" kaj aliaj rakontoj, Zagreb, 1988, p. 75

Prefikso EK-

Ŝiaj okuloj avelkoloraj, ŝiaj dikaj lipoj, ŝia hararo **ekcindra** radiis la ĉarmon de la dolĉa morto.
Giorgio Silfer, or., Italio, Literatura Foiro, 115, p. 39

La **ekĉeo** de lia filino Afrodita iom malstreĉis la intelektajn muskolojn.
Gonçalo Neves, or., Fonto, 140 (aŭg. 1992), p. 12

Ŝi ridas **ekdolĉe**...
Roger Imbert, el la kroata, Moderna Kroatia Prozo, Zagreb, 1979, p. 34

... dum ĉiuj aliaj estis jam **ekfraŭlinoj** dek-kvin aŭ dek-ses -jaraj.
Raymond Schwartz, or., Francio, Kiel akvo de l' rivero, Dansk Esperanto-Forlag, 1977, p. 37

Vi komprenos ke la ekskkursoj estas **ekgustumoj**. Vi frandu tiujn lokojn pli profunde iam.
S.Ŝtimec, or., Tempo, 2000, dec., p. 7

La maro preskaŭ tutapude moviĝis, spiris. La ondoj preskaŭ transsaltis la barieron. La vento **ek-ekkapti**s la sunombrelojn.
István Nemere, or., Hungario, Vi povas morti nur dufoje, HEA, Budapest, 1989, p. 17

Cetere lia ambicio estis senlima (ĉiel, kio estas ambicio, se ĝi estus limhava? Ĝi estus kio ajn, krom ambicio, ĉu?). **Ekkiam** li bezonis komputilon por modernigi...
Sereĝo Elgo, or., Literatura Foiro, 96, p. 15

"Kiel? Kial oni?? Doktoro Gulapez subite haltis kaj **ekkompreno** pentriĝis sur lia vizaĝo.
Deck Dorval, or., Jaĥto veturas for... kaj veturigas la morton, Flandra E-Ligo, Antverpeno, 1983, p. 84

Jam dum la Interkona Vespero, sur la placo antaŭ la kongresejo, etnaj muzikistoj kaj dancistoj donis antaŭguston kaj ĝojigis **ekkongresantojn**.
Marie-France Conde Rey, or., Francio, Heroldo de Esperanto, 10 (20 jul. – 9 aŭg.) 2005, p. 3

Freŝdata esplorado ĉe la landaj asocioj montras, ke la tuta konata movado kreas ĉiujare ne malpli ol 30 000 **eklernantojn**.
Jean-Louis Texier, or., Francio, Eventoj, 1992, jul./2, p .2

Jam la tria tago **ekmatenis**, kaj la tagiĝo blankis urbajn murojn...
el la pola, Quo Vadis, p. 221

Jam en la unua soneto, *Viriniĝo* pri knabino en aĝo de dekkvar jaroj, **ekmenstrua**, subaŭdiĝas kritiko al la edukantoj.
La virgulin' aŭskultas monologon
pri malpuraĵoj, kredas la mensogon.
La menso kredas, sed la karno, ne.
Christian Declerk, or., La Gazeto, 104 (jan. 2003), p. 26

– dum certa tempo... ridis Alex, la propra **ekpenso** videble plaĉis al li. Kaj la fakto, ke li povas tiamaniere nervozetigi la amikon.
István Nemere, or., Hungario, Krias la silento, Eld. Bero Berkeley, 2002, p. 81

Nicolle foriris. Ili du silentis minuton.
– Ĉu vi havas ian **ekpenson**? – demandis la virino.
Istvan Nemere, or., Hungario, Nesto de Viperoj, Impeto, Moskvo, 1994, p. 46

Se mi severe demandis lin, komence li aperigis sian kutiman rideton strangan kaj poste fariĝis **ekplora**.
El Japana Literaturo, Tokio, 1965, p. 112

"Nu, ni prenu nian kafon", Gjarta ekdiris, irante al la polilo. La kafo konsistis... **ekposte** ŝi prenis pelvon da lakto el la alkova breto...
Finn Elwarth, el la dana, Fonto, 262 (okt. 2002), p. 25

Mare Hiltbrand, 40 jara sviso, esperantisto ekde 1974, estas la nova prezidanto de LF-koop. Jen parto de lia **ekprezida** parolado.
Literatura Foiro, 167 (jun. 1997), p. 128

Do **reek**' al universitata studado, kiu komencis esti por mi preskaŭ profesio.
Donald Broadribb, or., Anglio, La Gazeto, 60 (okt. 1995), p. 17

Ĉiu verkisto volus aŭdi opiniojn pri sia verko, kaj neglekto fare de la kritiko plej ofte elvokas **eksilenton**.
Norda Prismo, 1972, 2, p. 75

Li forĵetis la litkovrilon kaj rigardis sian propran korpon kun obseda timo, jam vidante **ekŝanĝojn**, kiuj ankorau ne okazis.
Marjorie Boulton, or., Anglio, Okuloj, eld. "Stafeto", La Laguna, 1967, p. 125

Jes, jes. La semaforo, kun la senĉesa ruĝa brilo, la amare **ek-ektremantaj** ventoj, kaj la obstina pluvo – nur ili restis por mi.
Endre Tóth, or., Hungario, 25 Jaroj, HEA, Budapest, 1977, p. 195

Ili nun **ekvelis** for kaj havis bonan transiron.
Baldur Ragnarsson, el la islanda, Islandaj pravoĉoj, Eldona Societo Esperanto, Malmö, Svedujo, 1964, p. 73

La FILOZOFO: Mi supozas ke neantaŭvieblaj **ekventoj** povus ŝanĝi la prognozon de ĉiu meteologo.
Baldur Ragnarsson, el la islanda, La Tradukisto, 45 (nov. 2003), p. 12

Ĝuste en tiu momento malforta matena brizo ekblovis tra la urbo. La laktomaro tiam malordiĝis, ĝi estiĝis pli maldika kelkloke, kaj la tri viroj sur la sablovojeto kaptis **ekvidon** de domo, ili vidis kelkajn altajn...

Malte Markheden, el la sveda, Åke Holmberg, Ture Sventon en Londono, Svedio, Progreso, 1989, p. 18

El kolekto de Klara Ilutoviĉ:
Blovo de **ekEspero**. **Ekpoetaj** mallertaĵoj. Rigardi per okuloj **ekfamiliaj**. **Ekfloroj** de sovaĝa rozo. **Ekhonesteco**. **Ekkrepuska** silento. Oni ne trovis **ekmomente** respondon.

Prefikso EKS-

Mi ja scias, ke mi estas malperfekta homo en ĉiuj punktoj, estante eterna komencanta esperantisto, sed ekde mia juneco ĝis nuna **eksjuniĝo** mi trairadis la vojon de mia vivo.
Deguchi Kyotaro, or., Japanio, Oomoto, 1992, p. 41

Incendiis senkompate. Ene de trideko da minutoj la mondfama **monumento** estis **eks**.
Andy Künzli, or., Svislando, Literatura Foiro, 148 (apr. 1994), p. 73

Prefikso FI-

"Aŭskultu, fraŭlino Kleinholz, se vi dirus tiaĵojn ankoraŭfoje, mi faradus aplaŭdon sur vian **fi-lukon**". Ŝi intencis diri ion, ŝiaj maldikaj lipoj ektremis...
"Tenu la salivlukon fermita," li maldelikate diras.
Inge Rahm, el la germana, Fonto, 74 (feb. 1987), p. 32

Dum rugbea matĉo... la spektantaro, konsistanta el norduloj (kiuj laŭ Bossi favoras sendependiĝon), pere de sennombraj naciaj flagoj videble – kaj bruege – apogis la italan nacian teamon. Babili kun Bossi pri "rapida malapero" de Italio ŝajnis **fifrua**.
Giancarlo Baraldi/PG, or., Monato, 1998, 4, p. 8

"Peston al vi," **figestis** la estro. "Ni bezonas nenion, kion vi povas."
Steven Brewer, or., Literatura Foiro, p. 50

Vi estas **fibuŝa** buf' kaj honto al via komunumo kiu situas en infer'. [Anglio, vilaĝo, komenco de la 20-a jarcento.]
Grace Kirkwood, T.Steele, N.Nicholas, D.Broadribb, el la angla, Mary Webb, Malbeno kara, Beverley, 1994, Aŭstralio, p. 71

La tukon kun desegnoj disputas negocistoj, **fikoste** ĝin akiras.
Geraldo Mattos, or., Brazilo, Fonto, 263 (11, 2002), p. 3

Prefikso GE-

Onidiro ke la edzino de Aleksandro Jendrik – Tereza, ĉu ne? – jes, ke Tereza Jendrik kaj la bofrato Jankarlo **gekuŝadis**?
Johán Valano, or., Francio, Ĉu li bremsis sufiĉe?, Antverpeno – La Laguna, 1979, Tk (Stafeto), p. 44

Alvoke ŝi mansignis... sed la nerezistebla fiksrigardo ordonis al li resti. **Ge-ili** malaperis post la pordeto.
István Ertl, or., Hungario, Monato, 1991, 12, p. 26

... Mire, admire la okuloj ekkonas **geili**, diskune, maltondra silento, osa loĝanto, la karno tias... kaj *komputileroro* estos frandaĵo kompromisa por ankoraŭ unu generacio en la-la Akademio.
Poul Thorsen, or., Literatura Foiro, 151 (okt. 1994), p. 272

Ili unu **ge-kontraŭ** la alia sidis sur akvotubo apud la malalta plafono... Enbrake **ge-tenante** unu la alian per siaj etaj manoj tute kompareblaj al tiu de etaj infanoj aŭ de simiidoj... ilia angoro perceptiĝis per tremetado de ilia korpo dum iliaj belaj **ge-kunplektitaj** vostofaskoj, tute senmovaj... [temas pri bestetoj similaj je lorisoj kaj indrioj, nomataj E-te gliroj]
Andre Albault, La Gazeto, 83 (jun. 1999), p. 29

La Fernández-aj verkoj (kaj malpli emfaze ankaŭ la Nerviaj) ligas nin al la homa komuno ankaŭ per absolute mal-eburtura engaĝiteco. Fernández neniam povas soli aŭ **gesoli** en feliĉo.
István Ertl, or., Hungario, La Ondo de Esperanto, 2002, 6, p. 4

elnotis Anatolo Gonĉarov (Krasnojarsk)

SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO REVIVIĜOS

UEA instigas doni novan elanon al la festado de la lasta plena semajno de februaro kiel Semajno de Internacia Amikeco. Ĉi-jare ĝi pasos de la 20-a ĝis la 26-a de februaro. La tradicio komenciĝis en 1969, kiam okazis la unua SIA laŭ iniciato de la tiama vicprezidanto de UEA, la sveda esperantisto Erik Carlén. La devizo de la Semajno estas “Amikeco trans limoj”, kaj ĝia celo estas plifortigi la reciprokajn kontaktojn kaj senton de komuneco inter esperantistoj.

Precipe en la 1970-aj jaroj oni multe festis la Semajnon per specialaj kunvenoj en Esperanto-kluboj kaj sendado de salutkartoj al alilandaj esperantistoj. En multaj lokoj oni ankaŭ sukcesis realigi la deziron de Carlén pri ĝia festado ekster la Esperanto-movado per publikaj kulturaj aranĝoj. En iuj urboj la aŭtoritatoj oficiale aŭspiciis la Semajnon. Kun la paso de tempo la tradicio tamen bedaŭrinde malfortiĝis.

La ĝenerala sekretario de UEA Barbara Pietrzak skribas en la februara numero de la revuo “Esperanto”, ke “ekde nun Interreto kaj ĝiaj sociaj portaloj devus kaj povus esti utiligataj por vivigi kaj memorigi tiun pli ol 40-jaran tradicion de la Esperanto-komunumo”. Ŝi ankaŭ proponas aldoni al la Semajno kiel novan elementon la Tagon de la Gepatra Lingvo, la 21-an de februaro. “Ni kontaktu en niaj loĝlokoj asociojn de malplimultoj, kiuj nuntempe pro politikaj kaj ekonomiaj motivoj fariĝis firma karakterizaĵo de niaj socioj”, ŝi proponas. Kiel bonan ekzemplon ŝi laŭdas Esperanto-klubon de Stokholmo, kiu ekatentis grupojn de minoritataj lingvoj kaj komencis krei ligojn kun ili.

En la retejo de UEA troviĝas nun subpaĝo pri la Semajno de Internacia Amikeco. Al virtuala festado de la Semajno oni povas aliĝi en *Facebook*, kie ĝi havas propran paĝon.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

La 27-a Rusia Esperantista Kongreso

En 2000 Ĉeboksari jam akceptis REK, kaj en la gastama Ĉuvaŝio la kongreso pasis tre bone. Post 11 jaroj REK revenas al Ĉeboksari, sed ĉi-foje ĝi estos unigita kun Lingva Festivalo (LF) – la plej sukcesa aranĝo, kiun organizas esperantistoj por ekstera publiko. Oni memoru, ke la rusia LF-movado naskiĝis ĝuste en Ĉeboksari – la unua festivalo okazis tie en la fora 1996, antaŭ 15 jaroj. **Unuigo de LF kaj REK estas bonega ŝanco ĝui unikan etoson de LF, konatiĝi kun alloga urbo kaj kulturo de interesa respubliko kaj samtempe viziti tradiciajn esperantlingvajn programerojn** – prelegojn kaj koncertojn.

Datoj, loko: 20 – 24 de oktobro 2011, Ĉeboksari

Ogranizantoj: Rusia Esperantista Unio kaj Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko

Kadre de la programo: LF, scienca konferenco, KGS kun partopreno de urbaj teamoj, ekskursoj (laŭ la urbo, al muzeoj: Nacia, Belarta, Biera ktp), prelegoj kaj koncertoj, Konferenco de REU.

Aliĝkotizoj:

	ĝis 01.06.2011	ĝis 01.09.2011	poste, inkl.surloke
Loĝantoj de Ĉeboksari	100 rub.	200 rub.	300 rub.
Loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ	300 rub.	400 rub.	500 rub.
Loĝantoj de aliaj landoj	20 eŭroj	25 eŭroj	30 eŭroj

Rabato por infanoj kaj adoleskantoj (je 20.10.2011 malpli ol 18 jaroj): 50% de la kotizo

Malrabato por nemembroj de REU kaj/aŭ EAĈR: 200 rubloj. La sumo estas pagata dum registrado en REK, membreco estas kontrolata same tiam. Membreco en REU signifas ajnan membrokategorion krom "Amiko de REU".

La aliĝkotizo rajtigas je partopreno en ĉiuj eroj de kongresa programo, inkluzive de la Lingva Festivalo. ***Ekskursoj estos aparte pagataj surloke.***

Invitleteroj por eksterlandanoj estas traktataj individue en ĉiu okazo.

Loĝado.

Urbaj hoteloj ("Ĉuvaŝija" aŭ "Rossija", retejo por ambaŭ – <http://chebhotel.ru/>). Oni povas rezervi hotelĉambrojn aŭ memstare, aŭ pere de organizantoj. Malpli kosta varianto estas studenta komunloĝejo. Por ricevi garantiitan loĝlokon en hotelo aŭ komunloĝejo, oni devas komuniki sian bezonon ĝis la 1-a de septembro. Pli

detala informo pri rezervado aperos poste.
Krome oni povas interkonsenti pri aparta loĝado ĉe konatoj.

Laŭ decido de membroj de la ŝakklubo el la urbo Ardatov (Mordovio) Ivan Kitajkin sendis 1000 rublojn por subteni la Rusian E-istan Kongreson en Sankt-Peterburg. La Estraro de REU kore dankas la klubanojn pro la mondonaco!

Organiza komitato:
Grigorij Arosev – kunordigo, programo, Aleksandr Blinov – enloĝigo, lokaj aferoj, Marina Ivanova – kasisto, Svetlana Smetanina – REU-parto.

Adresoj
Reta adreso por diversaj demandoj: <kongreso@reu.ru>.
Poŝta adreso por sendi la monon: ***429951, Novoĉeboksarsk, ul. Vinokurova 8-63, Marina Borisovna Ivanova.***
Por aliĝi necesas sendi informon pri la aliĝanto (nomoj, adresoj, telefonnumeroj, naskiĝdato) laŭ la sama adreso aŭ plenigi la aliĝilon rete ĉe <http://reu.ru/kalendaro/alighilo/REK-27/>.
Krome funkcios kotizperantoj en kelkaj urboj, kiuj kolektos monon. La nomoj de perantoj estos anoncitaj poste.

INTERVJUOJ KUN EKSPREZIDANTOJ DE REU

Daŭrigante serion de materialoj dediĉe al la 20-jariĝo de REU, ni ekpublikigas mallongajn intervjuojn kun ĉiuj eksprezidantoj de REU, en kiuj ili koncize rakontas pri sia agado kaj prezentas proprajn vidpunktojn pri la nuna stato de REU. Sinsekvo de la intervjuoj estas kronologia.

Viktor Aroloviĉ (prezidado: decembro 1991 – novembro 1993)

– Vi iĝis prezidanto kiam Rusio jam fakte sendependiĝis, kaj estonteco de USSR estis klare decidita. Kion vi spertis lige al tio – ĉu vi devis fari ion specialan pro tio, aŭ estis formala ago, renomi SEU je REU?

– La transformon de SEU al REU efektivigis la 10-a Kongreso de SEU (Kolomna, decembro 1991). Tiumomente SEU jam kelkajn monatojn estis oficiale registrita organizaĵo. Tial tre gravis fari seneraran decidon pri ĝia estonto. Unu el eblaj solvoj povus esti konfederacio de memstaraj E-asocioj sur la ekssovetia teritorio, sed tio implicus riskon perdi la statuson de aliĝinta *landa* asocio en UEA. Tial la Estraro de SEU proponis alian solvon – sekvi la ekzemplon de pluraj aliaj sovetiaj organizaĵoj, kiuj reregistriĝis kiel rusiaj. Por tio la Estraro preparis necesajn amendojn en la Statuto, kiujn en la Kongreso mem finprilaboris ties Redakta komisiono.

Tamen multajn prave zorgigis la sorto de eksterrusiaj SEU-membroj. Ili proponis enigi en la titolon "Rusia Esperantista Unio" la vorton "Malfermita". Tiu propono ne ricevis sufiĉe da voĉoj, sed la Statuto plu ebligis, kaj la Kongreso speciale emfazis tion, membriĝi al aliŝtatanoj – tio estas praktikata ĝis nun.

– Kiuj ĉefaj problemoj estis alfrontitaj de REU tiutempe?

– La plej ĉefa problemo estis reregistro de la Statuto laŭ la rusiaj leĝoj. Mi kun

Nikolao Gudskov plurfoje vizitis la Ministerion de Justico de Rusio, kaj ĉiufoje alia funkciulo trovis pliajn nekonvenaĵojn en la Statuto kaj insistis pri revortumo. Krome, necesis kolekti aron da akompanaj paperoj, inkluzive amason de klubaj protokoloj pri decido aliĝi al REU. Ĉio ĉi daŭris la tutan jaron, kaj eĉ por la sekva REU-Kongreso (Peterburgo, novembro 1992) la definitiva versio de la Statuto ankoraŭ ne pretis. Nur komence de 1993 jam la nova Estraro voĉdonis por la statutaj amendoj (havante por tio mandaton de la Kongreso) kaj ni ricevis la registriĝan ateston.

Tre ĝenis la agadon de REU la financa problemo. En la lando furiozis inflacio, tial ni estis devigitaj plialtigi la kotizojn ne nur komence, sed ankaŭ interne de jaro (stimulante per tio pli fruan kotizpagadon). Krome, ĉar la supremenciita reregistriĝo postulis pagon de konsiderinda imposto, por tio estis lanĉita speciala fonduso.

– La estrarkonsistoj, elektitaj en 1991 kaj 1992 (aparte en 1991) estis ege multnombraj. Kiucele oni elektis tiom multkapan estraron, kaj kiel okazis la komunikado inter la estraranoj?

– Efektive, kompare kun la nuna sesopo la tiamaj konsistoj ŝajnas enormaj. Sed tiam oni tiel ne perceptis. La Estraro de 1991 estis heredita ankoraŭ de SEU, ĉe kies refondo en 1989 ni aplikis la duŝtupan gvidsistemon, kutiman laŭ ASE: Estraro (24 personoj) – Prezidio (7). En 1990 la 9-a Kongreso de SEU post vigla diskutado decidis transiri al unueca gvidorgano, la Estraro. Post 24 estraranoj la kvanto 14 tute ne ŝajnis granda. Ĉe la sekva reelekto en 1992 okazis plia redukto – ĝis 10 estraranoj, ktp.

Viktor Aroloviĉ apud la Zamenhof-monumento en Odeso (la foto, sendita por la Zamenhof-taga konkurso en Jekaterinburg)

Necesas diri, ke tiam la REU-agado profiliĝis alie ol nun, kaj plimulton de estraranoj konsistigis estroj de plej aktivaj komisionoj. Laŭ Jarlibro 1992, REU havis 15 (!) komisionojn pri diversaj agaddirektoj. Bedaŭrinde, dum la posta evoluo ili praktike ĉiuj poiome malaperis...

La interestrara komunikado estis certe pli peza ol nun: ekzistis nek retpoŝto nek poŝtelefonoj. Ni uzis la paperan poŝton (por pli-malpli regula cirkulerado) kaj hejmajn aŭ oficajn telefonojn (por urĝaj aferoj) – tiu skemo estis bone konata el SEJM-a epoko. Certe okazadis estrarkunsidoj – ĉu senpere antaŭ kaj post la Kon-

gresoj, ĉu laŭbezone en la ĉefurbo, ĉar moskvanoj konsistigis iom pli ol duonon de la estraranoj.

– Via posteulo estis Andrej Ananjin, vi estis vicprezidanto. Ĉu vi eĉ ne balotiĝis, aŭ malgraŭ la venko de la alia kandidato decidis resti en la Estraro?

– Mi ja balotiĝis, sed Andreo gajnis la voĉdonon (14 voĉoj kontraŭ 4). Kiam li proponis, ke mi restu en la Estraro, mi senhezite konsentis, ĉar laŭ mi ĝenerale estas bone, se eksaj gvidantoj ne estas forĵetataj en duonan aŭ eĉ plenan forgeson, sed plu aktivas sur malpli grava posteno. Cetere, similan situacion mi jam estis spertinta: en 1976 post la dujara prezidanteco en SEJM oni konfidis al mi vicprezidantecon kaj redaktadon de "Aktuale".

– Lastatempe REU spertas ne tre bonan periodon. Laŭ vi kion la Unio nun reale povas fari por landa movado?

– La demando ŝajnas al mi iomete sofisma, ĉar REU mem estas organizita institucio de la landa movado. Do, kion povas fari REU por si mem? Mi povas respondi nur banale: ĉio bona, farota de REU por Esperanto (aŭ per Esperanto, sed ankaŭ tio finfine estos "por"), servos al kresko de REU-prestiĝo.

Sed se temas pri la ekster-REU-a parto de la movado, do pri tiuj rusiaj E-istoj, kiuj diverskiale ne membras en REU, – REU konsideru ilin kiel kampon por plivastigo de siaj vicoj. Mi certas, ke ĉiu nova aliĝo estas utila por REU, kaj por la aliĝanto mem. Sed la varbado estos des pli efika, ju pli konsekvence oni emfazos la avantaĝon esti REU-membro kompare kun la "sovaĝa" E-ekzistado. Ekz., mi plurfoje pledis al diverskonsistaj Estraroj, kaj ne preterlasas la okazon ripeti tion publike, ke la diskutlisto de REU estu destinita unuavice por ties membroj; la ceteraj limiĝu je moderiga aŭ eĉ nur-lega reĝimo.

intervjuis G.Arosev

PRI ERASMO EN LA MAJA MALFERMA TAGO

Ĉi-jare pasas 500 jaroj de post la apero de *Laŭdo de l' stulteco*, per kiu la granda pensulo Erasmo de Roterdamo (1466-1536) en satira formo atakis ĉiajn antaŭjuĝojn kaj superstiĉojn. "Erasmo estas la plej granda filo de Roterdamo, sed antaŭ ĉio li estas la plej elstara figuro en la tuta historio de humanismo kaj ĝuste tial ni esperantistoj devas lin koni", skribis Osmo Buller, la recenzanto de la Esperanta traduko de lia ĉefverko en la revuo *Esperanto* (n-ro 1001 (5), 1989). Sekve la 34-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA omaĝos la Erasmo-jubileon per du prelegoj. D-rino Věra Barandovská-Frank faros ĝeneralan enkondukon al la vivo kaj verkaro de Erasmo, kaj Gerrit Berveling prelegos pri *Laŭdo de l' stulteco*, kiun li esperantigis el la latina originalo. La traduko aperis en 1988 okaze de la 73-a UK en Roterdamo.

La 34-a Malferma Tago okazos sabaton, la 14-an de majo. Krom la du prelegoj pri Erasmo kaj lia klasikaĵo, en la programo estos ankaŭ aliaj prelegoj, libroprezentoj kaj filmoj. La vizitantoj povos profiti de rabatoj en la Libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

NOVA PLEDO DE UEA ĈE UN POR LINGVAJ RAJTOJ

Universala Esperanto-Asocio intervenis en la 3-a sesio de la Forumo pri Minoritatoj de Unuiĝintaj Nacioj, kiu okazis en la Palaco de Nacioj en Ĝenevo la 14-an kaj 15-an de decembro. Nome de UEA parolis Cesco Reale, unu el la konstantaj reprezentantoj de la Asocio ĉe UN en Ĝenevo. La Forumo pri Minoritatoj estis starigita de la Konsilio pri Homaj Rajtoj de UN en 2007, kaj UEA kontribuas al ĝiaj laboroj ekde la komenco. Jen Esperanta traduko de la alparolo, kiu estis farita en la franca lingvo:

Sinjorino Prezidantino, gesinjoroj,

Mi parolas nome de Universala Esperanto-Asocio, kies membroj, parolantoj de la internacia lingvo Esperanto troviĝas en pli ol 120 landoj.

En la projekto de rekomendoj traktata hodiaŭ, specife en la ĉapitro 32, plurloke aperas mencio pri bezono de tradukado. Fakte, por povi esti aktiva en la ekonomia vivo, oni bezonas kompreni la leĝojn kaj la dokumentojn rilatajn al tiu medio en sia propra lingvo. Hodiaŭ ni deziras altiri vian atenton je la klopodoj de Eŭropa Unio pri malrespekto de la egaleco de ĉiuj lingvoj de la membro-ŝtatoj, malgraŭ ke tiu egaleco estas solene deklarita en ĉiu fundamenta dokumento de EU. Koncerne patentojn, temas pri klopodo malebligi la utiligon de aliaj lingvoj ol la germana, la angla kaj la franca dum la depono, ekzameno kaj publikado de patentoj. Tiu maniero procedi kreus maljustan avantaĝon por firmaoj kaj civitanoj de landoj, kie tiuj ĉi lingvoj estas uzataj. La utiligo de nur tri lingvoj koncerne patentojn en Eŭropa Unio, kie estas 23 oficialaj lingvoj, kaŭzus malavantaĝojn maljustajn al firmaoj kaj civitanoj en landoj, kie tiuj ĉi lingvoj ne estas oficialaj, kaj tia decido estus sendube kontraŭa al la principo de reala partopreno de ĉiuj en la ekonomia vivo. Tia decido malvalorigus lingvojn, kiuj hodiaŭ ankoraŭ estas prestiĝaj, kaj donus avantaĝon al kelkaj privilegiataj lingvoj. Estas evidente, ke lingvoj kiel ekzemple la itala aŭ la pola, kies utiligo estus eksludita de la administra proceduro, kaj en kiuj oni ne plu uzus aŭ kreus vortojn rilatajn al teknikaj malkovroj kaj uzadoj, estus destinataj al dialektiĝo kaj la parolantoj de tiuj lingvoj iĝus duarangaj civitanoj.

La 12-an de decembro, komatrestante en la Sklifosovskij-kliniko kaŭze de la aŭtoakcidento, en la aĝo 90 jaroj forpasis Vladimir Aleksandroviĉ Edelŝtejn. Inteligenta, tre modesta kaj ege ĉarma homo, li restos ĉiam en nia memoro.

Svetlana Smetanina (Moskvo)

Ni protestas forte kontraŭ tiuj klopodoj malaperigi la lingvajn rajtojn de granda nombro de la civitanoj de Eŭropa Unio, kaj kontraŭ la malracia rifuzo pri ekplanado de uzo de neŭtrala lingvo por la interkomunikado, kiel ekzemple la latina, aŭ pli bone: la internacia lingvo Esperanto. Tiu ilo de interetna komunikado, kies uzo ebligas respekti lingvajn kaj kulturajn minoritatojn, estas tre vivanta hodiaŭ. Pri tio atestas multaj libroj, konferencoj kaj eventoj pri sciencaj kaj teknikaj temoj, diplomlaboraĵoj, kaj la ekzisto de sciencaj, fakaj asocioj utiligantaj Esperanton.

Dankon pro via atento.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

REU-PREMIO EN 2010

La Estraro de Rusia Esperantista Unio lanĉis ĉiujarfinan REU-premion. Ĝin ricevos rusiaj esperantistoj, kiuj havas apartajn meritojn antaŭ la landa movado, do temas ne nur pri aktivado en/por REU.

Post ioma diskuto la Estraro decidis, ke la premio ne estos mona (bedaŭrinde REU ne estas sufiĉe riĉa por enmanigi solidan premion, kaj donaci bagatelan sumon estus malrespekto al premioto). La esenco de REU-premio estos alia. Ĉiuj ni jarfine havas certajn dezirojn, kaj en pleja profundo de la animo ni kredas, ke Avo Frosto ja ekzistas kaj sekvajare li nepre plenumos niajn revojn. REU volas asisti Avon Froston. Tial laŭreato rajtos je plenumo de unu movada deziro (ĉu helpo pri aliĝo al kongreso, ĉu abono de periodaĵo, ĉu io alia). Konkretaj deziroj estos traktitaj private inter la Estraro kaj la laŭreatoj.

Krome la Estraro decidis, ke ĉiujare estos ne pli ol du premiitoj (eble nur unu). Sendube ni havas multajn aktivajn esperantistojn, kiuj meritas esti menciitaj. Do iom-post-iom ni provos mencii ĉiujn. Ni esperas, ke nia iniciato estos subtenata ankaŭ en la postaj jaroj.

Kaj nun la plej interesa momento. Laŭreatoj de REU-premio en 2010 estas:

1. Anatolij Ivasenko – pro vigligo de E-movado en Krasnodara regiono (aktivado en ruslingva gazetaro, okazigo de E-kursoj, fondo de E-klubo kaj organizado de E-renkontiĝo). REU anticipe gratulas Anatolij Ivasenko pro la 45-jariĝo de lia E-vivo!

2. Georgij Kokolija – pro la redakta kaj eldona aktivado. Li komencis tiaspecan agadon en 1993 per eldonado de *SEJM-info* – en la dua duono de la 90-aj sola regule aperanta informfonto pri junulara agado en Rusio. Sed la ĉefa laboraĵo de Garik iĝis *Rusia E-gazeto* (REGo), kies 10-jariĝo estis celebrita en 2010 (same kiel la 30-jariĝo de E-vivo de Georgij). REGo estas altkvalita eldonaĵo, kiu bone respegulas la staton de E-movado en nia lando.

Gratulojn al Anatolij kaj Georgij! Kontaktu la Estraron por interkonsenti pri plenumo de viaj deziroj.

Kaj plej sincerajn bondezirojn al ĉiuj pro la Nova jaro!

Grigorij Arosev (Moskvo)

REU-MEMBROJ POR 2011

DUMVIVAJ MEMBROJ

Aĥmet Gulnara (Kazaĥio), Andrjuŝkin Igorj (Moskvo), Aroloviĉ Viktor (Moskvo), Belov Aleksandr (Leningrada reg.), Berdiŝev Viljam (Moskvo), Bojĉin Jevgenij Hebrea aŭtonoma regiono), Bronov Sergej (Krasnojarsk), Ciganov Oleg (Sankt-Peterburg), Cobb Steve (Moskvo), Cvetkova Valerija (Sankt-Peterburg), Ĉerenkova Larisa (Rjazana reg.), Ĉertilov Miĥail (Niĵnij-Novgoroda reg.), Derevjanniĥ Sergej (Moskva reg.), Derjugin Aleksandr (Saratov), Diesjatz (San Marino), Djes Dva (Italio), Gluĥov Aleksandr (Kaliningrad), Gluŝik Vladimir (Ukrainio), Gnedaŝ Nikolaj (Krasnodara reg.), Gonĉarova Irina (Moskva reg.), Grigorenko Vasilij (Ukrainio), Griŝin Nikolaj (Latvio), Gudskov Nikolaj (Moskvo), Jakovlev Jurij

(Pskova reg.), Ĵuravljov Aleksej (Krasnojarsk), Karcev Jurij (Uljanovsk), Kauc Valdemar (Estonio), Kokolija Georgij (Moskvo), Kolganov Andrej (Usono), Kolker Boris (Usono), Kozin Igorj (Vologda), Kurolap Zinovij (Kanado), Kuznecov Sergej (Moskvo), Laskina Marina (Tula reg.), Lipec Vladimir (Moskvo), Manjaĥin Jurij (Moskvo), Medvedev Lev (Moskvo), Melnikov Valentin (Moskvo), Miĥajlov Nikolaj (Leningrada reg.), Paseĉnikov Jurij (Tomsk), Pikov Gennadij (Novosibirsk), Pogorelaja Svetlana (Ukrainio), Roganova Rimma (Perma reg.), Salomatov Aleksej (Moskvo), Samodaj Vladimir (Moskvo), Sapoĵnikov Aleksandr (Ivanova reg.), Seguru Valentin (Moskva reg.), Sidorov Anatolij (Sankt-Peterburg), Ŝapoŝnikova Larisa (Arĥangeljsk), Tjuljaĥov Spartak (Jakutio), Tujakin Georgij (Moskvo), Voloŝin Vjaĉeslav (Ulan-Ude), Vulfoviĉ Lev (Germanio), Zozulja Boris (Rostov-na-Donu)

MECENATOJ

Kitajkin Ivan (Mordovio), Kondratjev Valerij (Voroneĵ), Loŝmanov Anton (Komsomoljsk-na-Amure), Mitin Aleksandr (Niĵnij Novgorod), Odincov Aleksej (Permj), Osipova Arina (Jekaterinburg)

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Arosev Grigorij (Moskvo), Bespalov Vladimir (Soĉi), Burgar Lilija (Rostova reg.), Ĉerneckij Nikolaj (Jaroslavla reg.), Ĉupin Bronislav (Iĵevsk), Ĉuprakova Nina (Moskvo), Goldobina Valentina (Krasnodara reg.), Ivanov Vjaĉeslav (Sankt-Peterburg), Jaĥina Alla (Krasnojarsk), Jaroŝenko Jelena (Rostova reg.), Kaminina Tatjana (Orenburg), Kivajev Jurij (Maria Respubliko), Klementjeva Tatjana (Perma reg.), Kolodin Miĥail (Sankt-Peterburg), Kondraŝkina Tatjana (Sankt-Peterburg), Kondratjev Boris (Sankt-Peterburg), Konjaŝova Svetlana (Ĥabarovska reg.), Kovaljova Valentina (Novosibirsk), Krivoŝeev Denis (Niĵnij-Novgoroda reg.), Kuljkov Jevgenij (Vladimir), Lenskaja Galina (Moskva reg.), Lisova Natalja (Moskvo), Loskutova Tatjana (Ivanovo), Melnikov Aleksandr (Rostov-na-Donu), Milner Aleksandr (Moskvo), Minin Vladimir (Tomsk), Neĉaev Nikolaj (Irkutsk), Novikova Ljudmila (Moskvo), Opletajev Vladimir (Tjumena reg.), Pautova Tatjana (Sankt-Peterburg), Puŝkarjov Valentin (Jekaterinburg), Roĵdestvenskij Vjaĉeslav (Ĉeljabinsk), Sibirceva Valentina (Lipecka reg.), Sipoviĉ Valerij (Moskva reg), Strelec Sergej (Ĉeljabinsk), Sudakov Vladimir (Soĉi), Sudakova Aleksandra (Moskvo), Ŝoroĥova Natalja (Moskva reg.), Terentjeva Galina (Ĉeljabinsk), Terjoĥin Vladimir (Jekaterinburg)

FAMILIAJ MEMBROJ

Guseva Natalja (Sankt-Peterburg), Loskutova Maja (Ivanovo), Mironova Irina (Moskvo), Terentjev Nikolaj (Ĉeljabinsk)

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

EK "Verda suno" (Dimitrovgrad) (10 membroj): *Aĥmetova Raisja, Ĥafizova Marija, Ĥoĥrjakova Galina, Iljutkina Tatjana, Izmajlova Galina, Kirik Tamara, Rodioniĉeva Lidija, Rogova Ljudmila, Savaneeva Lidija, Sedova Ljudmila*

E-klubo "Esperanto" (Jelec) (10 membroj): *Gorjaĉiĥ Jekaterina, Jaickaja Vera, Kuleŝova Vera, Merenkova Tamara, Saljkova Galina, Ŝadrikova Aljbina, Zlobina Alla, Zuev Vladimir A., Zuev Vladimir V., Zueva Nina*

Krasnodara E-klubo (20 membroj): *Bondarenko Galina, Bondarenko Julija, Celikova Nina, Ĉinĉenko Anatolij, Ĉinĉenko Marija, Dmitrijeva Marija, Dudka Viktor, Ivasenko Anatolij, Jabĉinskij Anton, Jefimenko Miĥail, Kocarj Marina, Kuriloviĉ Ivan, Ljubavina Viktorija, Maljcev Sergej, Paveljev Gennadij, Popova Svetlana, Simonov Igorj, Ŝelistov Vladimir, Ŝelistova Jevgenija, Vasilenko Nelli*

Esperanto-klubo "EK-MASI" (Moskvo) (29 membroj): *Beljaeva Jekaterina, Boljŝakov Roman, Cukanov Stanislav, Ĉajka Oleg, Gamaleja Anna, Graĵdanova Oksana, Griĉik Andrej, Grustnjov Kirill, Ĥlabistov Georgij, Ivancova Marina, Ĵitĉenko Maksim, Kirdjaŝkina Marina, Kozlov Igorj, Krjukov Nikolaj, Kudrjavcev Jevgenij, Ljubuŝina Jekaterina, Mazurec Julija, Nikolaeva Natalja, Orlov Sergej, Paramonov Andrej, Penjkov Andrej, Penjkova Julija, Rjabuĥin Aleksandr, Selivanova Anastasija, Sigaĉjov Aleksandr, Skrjabina Natalja, Smetanina Svetlana, Ŝiŝkina Svetlana, Zarubina Julija*

EK "Murmano" (Murmansk) (9 membroj): *Fukuŝima Rumi, Goriĉenko Oljga, Jakunin Sergej, Koljada Nadeĵda, Makarov Aleksej, Poĵilova Ljudmila, Rjazancev Andrej, Trubkina Nelli, Uljanova Galina*

Novoĉ-EK (Novoĉerkassk) (7 membroj): *Ageeva Svetlana, Danaeva Galina, Demĉenko Irina, Gorodeckaja Irina, Omeljĉenko Jurij, Omeljĉenko Nina, Tenengoljc Julija*

Societo "Espero" (Sankt-Peterburg) (10 membroj): *Artemjeva Tatjana, Butkeviĉ Anna, Celaritskaja Natalja, Ficova Svetlana, Izmajlova Nesipkulj, Jemeljanenko Ljudmila, Maliŝeva Jekaterina, Ribak Nikolaj, Savina Natalja, Vinogradova Anna*

E-klubo "Laro" (Soĉi) (12 membroj): *Belenjuk Galina, Grankina Nadeĵda, Grankina Polina, Polisĉuk Irina, Polisĉuk Valentina, Olejnikova Natalja, Derevjanko Vladimir, Lavrovskij Aleksej, Soniĉeva Larisa, Sorokina Julija, Ŝestakova Marina, Timofejeva Lidija*

Tjumena Esperanto-klubo "Revo" (11 membroj): *Aleksandrova Irina, Dvornikov Aleksej, Golovkina Anastasija, Insapova Eljvira, Kalaŝnikov Aleksandr, Mamkin Mansur, Sokolovskij Nikolaj, Stepaĉjova Marina, Veselov Pavel, Veselova Tatjana, Voloĵanin Andrej*

Volgodonska E-grupo "Stipo" (5 membroj): *Afanasjeva Aljona, Afanasjeva Jelena, Fajzulin Grigorij, Koteljnikov Aleksandr, Koteljnikova Jekaterina*

Plena aktuala listo de la membroj troveblas en la ttt-ejo de REU laŭ la adreso <http://reu.ru/membrolisto/>.

KOTIZOJ DE REU/REJM POR 2011

Membri en REU oni rajtas ekde la aĝo 18 jaroj; 14-17-jaruloj rajtas aliĝi kiel kandidatoj.

Individua kotizo – 200 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 20 eŭroj) ĝis la 28-a de februaro 2011, 250 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 25 eŭroj) ekde la 01-a de marto 2011; inkluzivas la membrokarton, Jarlibron/Manlibron de REU, Bultenon de REU en elektronika formo (laŭpete – en la papera) kaj aliajn informojn de REU, voĉdonrajton en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU.

Mecenata kotizo – 500 rub.; inkluzivas ĉion la saman kiel por la individua kotizo, krom unu escepto: sur la membrokarto estos skribita "Mecenato de REU".

Dumviva kotizo – 5000 rub. (por ekster-KSŜ-anoj – 500 eŭroj); inkluzivas ĉion la saman kiel por la individua kotizo dum la tuta vivo.

Familia kotizo – 100 rub.; inkluzivas la membrokarton, voĉdonrajton en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU. La familiajn kotizojn rajtas pagi samadresaj parencoj de individuaj, dumvivaj aŭ mecenataj membroj.

Kolektiva membrokotizo – 70 rub. por ĉiu aligita membro (la aliĝintaj kolektivoj pagas minimume por 5 aligitaj membroj); inkluzivas po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro/Manlibro de REU por kluboj kun 5-15 aligitaj membroj kaj por ĉiu aldona deko de la aligitaj membroj, aliajn informojn de REU por la kolektivo; la membrokartojn, voĉdonrajtojn en Konferenco de REU, rabatojn en E-aranĝoj de REU por la aligitaj membroj.

Aliĝkotizo – 300 rub., unufoje pagata de nova aliĝinta kolektivo. La jamaj aliĝintaj kolektivoj ne pagas ĝin. La nova kolektivo iĝas regiona organizaĵo de REU kaj laŭpete ricevas dokumenton pri tio. Se la kolektivo ne pagas kotizojn por aligitaj membroj dum du sinsekvaj jaroj, ĝi estas konsiderata likvidiĝinta kaj poste devus denove aliĝi al REU.

Amiko de REU – senpage; inkluzivas partoprenrajton (sen voĉdonrajto) en Konferenco de REU, Bultenon de REU en elektronika formo kaj aliajn informojn. Oni rajtas aliĝi kiel "Amiko de REU" nur unufoje. Persono, sin anoncanta "Amiko de REU", devas plenigi aliĝilon kaj mencii sian retadreson.

Rabatita abono de REGo – 400 rub. (ekster Rusio – 20 eŭroj), por ĉiuj membroj. La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon en 2001-2003, plu ricevados REGon sen aldona pago.

Ĉiuj membroj de REU kun la aĝo malpli ol 31 jaroj aŭtomate iĝas membroj de la junulara sekcio REJM (Rusia Esperantista Junulara Movado) kaj ricevas voĉdonrajtojn en REJM-voĉdonoj.

Membroj de REU iĝas aligitaj membroj de Universala Esperanto-Asocio, la malpli ol 31-jaraj – ankaŭ de TEJO.

Aliĝilojn, rublajn kotizojn kaj rabatitajn abonpagojn por REGo sendu (poŝtmandate) al: ***142717, Московская область, Ленинский район, п/о Развилка, до востребования, Наталье Николаевне Шороховой***; eblas ankaŭ pagi per la sistemo **Yandex-denjgi**, numero de la "monujo" estas ***41001612527392***. La eŭraj kotizoj pagendas al la konto **reua-p** ĉe UEA.

Eksciu, ke...

PLENA ILUSTRITA VORTARO EN LA RETO!

Unu el la plej famaj E-verkoj de lastaj jardekoj certe estas “Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto”, mallonge PIV. La organizo “Edukado@Interreto” (E@I) kunlabore kun Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) intencas krei ĝian retan kaj senpagan version. Jam estas subskribita kontrakto, laŭ kiu E@I kreos la retejon kaj SAT disponigos la enhavon – la elektronikan version de la fama vortaro.

E@I nun lanĉas donac-kampanjon por kolekti bezonatan sumon – 10000 eŭrojn. Se vi opinias la retan PIV subteninda iniciato, ni petas vin helpi ĝin konstrui. Pri la aktuala stato de donacoj ni ĝisdate informados en la retejo <http://www.vortaro.net/> kaj sendante retmesaĝojn al donacintoj. Ĝis apero de PIV vi povos ĉe tiu ĉi adreso trovi ĉiujn bazajn informojn pri la projekto, pri ĝia aktuala stato kaj eblon finance kontribui al la projekto. En la sama retpaĝo aperas listo de donacintoj.

Jam multajn jarojn PIV estas la plej ampleksa difin-vortaro en Esperanto, sed bedaŭrinde pro sufiĉe granda kosto la papera eldono ĝis nun estis havebla nur por relative malgranda grupo de Esperanto-parolantoj. Post apero de la reta versio la situacio tute ŝanĝiĝos, la vortaron povos uzi tute senpage ĉiuj uzantoj, kiuj havas aliron al la Interreto.

La projekto postulos grandan kelkmonatan laboron de kelkaj profesiuloj. Ĉefa defio de la projekto estas la ĝusta transpreno de ĉiuj datumoj, ĉar la programo, per kiu estis ĝis nun kreata PIV, estas jam eksmoda, tre malnova kaj ne taŭga por simpla reta transpreno (ekz. ĝi ne uzas Unikodon, malfacilas krei HTML de ĝi, ĝi ne permesas facilan konvertadon de datumoj al iu alia pli uzebla formo ks.).

La projekto de reta PIV havas pli altajn ambiciojn, ol esti nur simpla cifereca versio de la papera eldono. Ĝi havas pli grandan potencialon, kiun la kreantoj de la retejo volus plene eluzi. La retejo havos forumon por ĉiu unuopa vorto, kiu ebligos viglan diskuton pri diversaj terminoj. Ĉiu povos kontribui, proponante eblajn novajn esprimojn, taŭgajn uzojn de vortoj ks. Laŭ la plano la retejo estos uzebla ne nur per komputiloj, sed ankaŭ per poŝtelefonoj. Estonte plej verŝajne eblus aranĝi, ke la vortaro estu uzebla ankaŭ ekster la reto, kiel instalebla programo.

Ĉu vi volus havi PIV en via poŝo? Vi povas helpi realigi tion! Donaci monon eblas per pluraj manieroj. Se vi havas komentojn, ideojn aŭ dezirojn pri la projekto, bv. kontakti la teamon de la projekto <teamo@vortaro.net>. Ni ĉiam ĝojas pri ĉiaspeca kunlaboro!

E@I

APERIS LA UNUA "KONTAKTO" KUN RADIKALE NOVA VIZAĜO

La socikultura revuo de TEJO, *Kontakto*, kompletigis la jarkolekton 2010 per la duobla numero 5-6 (239-240). Ĝi estas la unua kajero realigita de la nova redaktoro Rogener Pavinski. Krom bunta enhavo, grafike ĝi estas radikale alia ol antaŭe. Ok el la 28 paĝoj estas plenkoloraj. Same radikale *Kontakto* laste transformiĝis en 1992, kiam Francisco Veuthey redaktoriĝis. La logotipo dezajnita de li plu restas, ĉar en la voĉdonado en la retejo de Kontakto ĝi gajnis plej multe da subteno.

"Vi nepre rimarkos kiom bela nia revuo fariĝis; la legado certe fluos pli ĝue kaj plezure", skribas fiere la nova redaktoro en sia enkonduko. "Por helpi min en tiu tasko mi havis gravan kunlaboron de Romulo Felicio, kiun kelkaj konas de la koncertoj de *Supernova* en 2009. Li tre entuziasme akceptis plenumi la enpaĝigon kaj eĉ kunlaboris por unu el niaj rubrikoj."

La individuaj membroj kaj patronoj de TEJO kaj aliaj abonantoj de *Kontakto* jam povas legi la numeron rete. Ankaŭ en 2011 ili povos legi ĉiun numeron rete tuj, kiam ĝi eniros presejon. Ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas abonantoj, rajtas senpage konatiĝi kun la plene reformita revuo en la reto.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

ESPERANTO-LIBROJ AL NAŬ BIBLIOTEKOJ

Ĉiuj naŭ Esperanto-bibliotekoj, kiuj petis subvencion de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen de UEA, povos baldaŭ pliriĉigi siajn kolektojn de Esperanto-libroj. La estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj la Ĝenerala Direktoro Osmo Buller asignis subvenciojn el tiu fondaĵo je la suma valoro 1200 eŭroj. La plej grandajn subvenciojn, po 200 eŭroj, ricevis Biblioteko Interlingvistika Fenikso el Venezuelo kaj Dokumenta Esperanto-Centro el Kroatio. Po 120 eŭroj estis asignitaj al Pernambuka Esperanto-Asocio el Brazilo, Kleruma Esperanta Klubo el Kubo, Biblioteko por Skoltisma Interkultura Pedagogio el Rumanio, Unuiĝo de Verdaj Amikoj el Togolando kaj Biblioteko Culbert el Usono. La bibliotekoj de Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj kaj de Triesta Esperanto-Asocio el Italio ricevos librojn por po 100 eŭroj. Biblioteka Apogo Thorsen donas subvenciojn ĉiujare ekde 1997. La originala kapitalo, donacita de ges-roj Thorsen, sufiĉas ankoraŭ por unu disdono. Petoj por tiu lasta disdono devos atingi la Centran Oficejon ĝis la 15-a de oktobro 2011. Kun la peto oni sendu liston de deziratаj libroj, kiuj estu ordigitaj laŭ dezirindeco.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

SEKCIO "KONSULTEJO" DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

La sekcio Konsultejo (ĝis 2007 ĝi nomiĝis komisiono Lingva konsultejo) ekzistas en la Akademio de Esperanto ekde 1999. Ĉiu Esperanto-uzanto povas turni sin al la Konsultejo kun difinitaj lingvaj demandoj por ricevi konsilon aŭ rekomendon. Demandojn pri vortfarado (novaj nocioj, terminoj) la Konsultejo povas respondi relative rapide; komplikaj gramatikaj problemoj kutime postulas pli longan tempon. La respondoj ne estas decidoj de la Akademio de Esperanto, sed rekomendoj

de la Konsultejo; tamen la Akademio esperas, ke utilas tiu ĉi rapida servo, pri kies manko oni ofte plendis.

Kiel demandi la Konsultejon? Vi povas:

1. uzi la demandoformularon (preferinde) ĉe retejo de la Akademio <http://www.akademio-de-esperanto.org/konsultejo/index.html>;

2. sendi retmesaĝon al <konsultejo@akademio-de-esperanto.org>;

3. sendi leteron al la direktoro de la Konsultejo: *Alexander Shlafer, 1017 Northoak Dr, Walnut Creek, CA 94598, Usono.*

Klare formulu la demandojn kaj demandu konkrete. Bonvolu indiki ĉe urĝaj demandoj, ĝis kiam vi esperas ricevi respondon. Rapidan respondon ni povas garantii nur al demandintoj, kiuj indikis sian retadreson. La sekcio petas nepre ne sendi bagatelajn demandojn, kiujn povas respondi ĉiu sperta esperantisto serĉante en vortaroj kaj aliaj konsultlibroj.

Membroj de la sekcio (en alfabeta ordo de la ĉefnomoj): Marc Bavant, Gerrit Berveling, Renato Corsetti, Paul Gubbins, Miguel Gutiérrez Adúriz, Lena Karpunina, Boris Kolker, Li Shijun, Jouko Lindstedt, François Lo Jacomo, Anna Lowenstein, Geraldo Mattos Gomes dos Santos, Brian Moon, Barbara Pietrzak, Otto Prytz, Alexander Shlafer, Amri Wandel, Bertilo Wennergren.

La estraro de la Akademio de Esperanto

DE ZAMENHOF AL SOROS EN NOVJORKO

"De Zamenhof al Soros" estis la titolo de la ĉi-jara simpozio organizita de la Novjorka Oficejo de UEA. Tiu oficejo, kies ĉefa tasko estas prizorgi la rilatojn de UEA kun la ĉefsidejo de Unuiĝintaj Nacioj, ĉiujare organizas publikan aranĝon okaze de Zamenhof-tago la 15-an de decembro.

Temis pri historia trarigardo de la komenca periodo de Esperanto, organizita por prezenti du novajn librojn: anglalingvan biografieton de Zamenhof – mallongigitan version de la biografio verkita de Aleksander Korĵenkov antaŭ duo da jaroj – kaj nove tradukitan libreton de Tivadar Soros, kiu unue aperis en 1923.

La konata fakulino Esther Schor, profesoro ĉe la Universitato Princeton, priparolis la ligon kun Zamenhof per sia prelego pri "Zamenhof kaj estonteco", en kiu ŝi ekzamenis la koncepton de la kreinto de Esperanto pri la estonteco de la homaro kaj la rolo de Esperanto en tiu kunteksto.

La finan punkton en la periodo 1887-1923 traktis Humphrey Tonkin, la tradukinto de la verko de Soros, *Modernaj Robinzonoj*, kiu estis lanĉita en la simpozio. Tiu verko, nomata *Crusoes in Siberia* en sia angla versio, pritraktas la spertojn de la juna armea oficiro Tivadar Soros en militkaptitejo en Siberio dum la Unua Mondmilito, kaj lian postan eskapon. Eldonis ĝin la eldonejo *Mondial*, kun notoj kaj enkonduko de la tradukinto. Tonkin ankaŭ tradukis la libron de Soros pri la Dua Mondmilito, *Maskerado*. Li mem renkontis Tivadar Soros en kunveno en la aŭditorio de la UN-biblioteko en 1966, dum prelego de Ivo Lapenna. "Sed je tiu stadio mi ankoraŭ ne legis la libron", li konfesis, nek li povis prognozi, ke la filo de Tivadar tiel famiĝos. Alikaze, li ŝerce sugestis, "la konversacio estus tute alia".

La mezan parton de la simpozio okupis du programeroj. La historiisto Ralph

Dumain ekzamenis la grandan gazetaran reagon okaze de la vizito de Zamenhof al la Universala Kongreso en Vaŝingtono en 1910, kaj la filmisto Sam Green montris malnetan version de sia dokumenta filmo pri Esperanto. Sam Green estas jam konata inter esperantistoj pro sia filmo *Utopio en kvar movimentoj*. La nova, 25-minuta, filmo rilatas ekskluzive al Esperanto kaj estas ĉefe produkto de la filmado, kiun Green faris en kelkaj lastatempaj Universalaj Kongresoj.

Sed la plej granda surprizo estis parolado, kiu ne troviĝis en la antaŭvidata simpozia programo, nome tiu de la konata financisto George Soros, kiu, kune kun pluraj stabanoj (kaj ankaŭ kun sia filo Jonathan), venis al la fina parto de la simpozio por kune festi la lanĉon de la anglalingva traduko de la libro de sia patro Tivadar. George Soros, kiu ne estas en si mem subtenanto de Esperanto, sed pasie emfazas la patran influon en la propra edukado, parolis dum deko da minutoj pri Tivadar Soros kaj ankaŭ pri la rolo, kiun Esperanto ludis en lia propra vivo. Veninte al Britujo en 1947, li tuj kontaktis la lokajn esperantistojn, kiuj multe helpis al li. Li ankaŭ memoras renkontiĝojn kun E-literaturistoj en la frua infanaĝo.

George Soros kaj lia frato Paul kontribuis antaŭparolojn al la nova libro de la patro. Nome de la eldonejo, Ulrich Becker prezentis la libron al Soros; kaj Tonkin laŭtlegis parton de ĉapitro el *Maskerado* en la angla traduko.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

11 ESPERANTISTOJ REPREZENTAS UEA ĈE UNUIĜINTAJ NACIOJ

Kadre de siaj oficialaj rilatoj kun Unuiĝintaj Nacioj UEA rajtas akrediti reprezentantojn ĉe la oficejoj de UN. Surbaze de la decido de la Estraro la Ĝenerala Direktoro liveris al la monda organizaĵo rajtigilojn por 11 reprezentantoj en la kalendara jaro 2011. Ĉe la ĉefa sidejo de UN en Novjorko la ĉefreprezentanto de UEA estas Humphrey Tonkin. Aldonaj reprezenantoj estas Neil Blonstein, Thomas Eccardt kaj Scott Page. Blonstein krome laboras kiel volontulo en la Novjorka Oficejo de UEA. En Vieno la ĉefreprezentanto estas Hans Michael Maitzen, dum Gregor Hinker kaj Stella Maitzen estas aldonaj reprezentantoj. La estrarano de UEA pri eksteraj rilatoj Stefano Keller estas la ĉefreprezentanto en la UN-oficejo en Ĝenevo, lin asistas de Charmian Common, Nicole Margot kaj Francesco Reale.

Gazetaraj Komunikoj de UEA

IJK EN 2012 OKAZOS EN JAPANIO

TEJO ĝojas anonci, ke en 2012 la 68-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Naha, ĉefurbo de la Okinava insulo en Japanio. Organizos ĝin Japana Esperanto-Junularo (JEJ). La Okinavaj Insuloj troviĝas en sudokcidenta parto de Japanio, havas mirindan naturon, belegajn historiajn konstruaĵojn kaj speciale bongustan kuirarton. Okinavo proksimas al Tajvano, Ĉinio kaj Vjetnamio, do estas tre facile vojaĝi ankaŭ al la Vjetnama UK en Hanojo. Tio estos jam la dua fojo, kiam IJK gastos en Japanio. La unua junulara kongreso tie okazis en 1965 en la urbo Ōcu. Pliajn informojn eblas trovi ĉe la paĝaro de TEJO <http://tejo.org/eo/node/1186>.

(landa agado)

Vitalij Valentinoviĉ
Bianki
(1894-1959)

Vitalij Bianki estas unu el la plej famaj, ŝatataj kaj humanaj porinfanaj verkistoj, kiu verkis mirindajn rakontojn pri animaloj kaj pri naturo.

Li mem diris, ke li estas "tradukisto de senvorto", ja li tradukis al homa lingvo birdan pepadon kaj tutan ceteran animalan multvoĉecon.

Li naskiĝis la 30-an de januaro (la 11-an de februaro) 1894 en Sankt-Peterburg. Lia patro estis sciencisto-ornitologo, gardisto de Imperiestra zoologia muzeo ĉe la Scienca Akademio. La loĝejo de la gardisto situis kontraŭ la muzeo, kaj la juna Vitalij kune kun siaj fratoj ofte vizitis halojn de la muzeo kaj vidis tie pajloŝtopitajn bestojn kaj birdojn el diversaj landoj. En lia loĝejo estis malgranda zoologia ĝardeno kun vivaj katoj, hundoj, erinacoj kaj aliaj animaloj. Somere la familio de Bianki forveturis al vilaĝo Lebjaĵje. Ĉi tie la kvinjara Vitalij unuafoje konatiĝis kun la naturo kaj ekamis la arbaron kaj la arbarajn loĝantojn.

Vitalij Bianki havis diversajn interesojn, kaj klero lia estis diversa: li lernis en gimnazio, en Peterburga universitato (fakultato de naturaj sciencoj), en la arthistoria instituto. Sed la mondo de animaloj, la mondo de arbaro kaj ĝiaj loĝantoj estis ĉiam lia amo. Lia patro Valentin Ljvoviĉ kutimigis lin registradi ĉiujn observaĵojn kaj impresojn pri la vivo de la animaloj.

Vitalij Bianki loĝis dum kelkaj jaroj en Altajo, poste en Sankt-Peterburg li konatiĝis kun la fama poeto Samuil Marŝak, kiu enkondukis lin en rondon de porinfanaj poetoj kaj verkistoj. Rakontoj de Vitalij Bianki pri naturo ĉarmis ĉiujn, baldaŭ lia unua rakonto "Vojaĝo de ruĝkapa pasero" aperis en porinfana gazeto "Клён" ("Acero") kaj sekvajare aperis lia unua libro "Kies beko estas pli perfekta?"

La plej fama libro de la verkisto estas lia "Arbara gazeto" (1928), ĝi multfoje estis reeldonita kaj tradukita en multajn lingvojn.

Vitalij Bianki estas aŭtoro de pli ol 300 verkoj pri la vivo de la animala mondo. Liaj bonaj rakontoj kaj fabeloj edukis kaj edukas milionojn da infanoj pri bonkoreco al niaj najbaroj-fratoj-animaloj, pri zorgo kaj korfavoro al tiuj, kiuj tion bezonas.

Vitalij Bianki mortis la 10-an de junio 1959.

Lilija Burgar (Volgodonsk)

Vitalij Bianki[1]

NIGRA VULPO

Vintre en jakutia arbaro aperis nigra vulpo.

Nigraj vulpoj estiĝas tre malofte. Kaj ties felo pli multekostas ol ĉiuj aliaj feloj.

Jen ĉiuj ĉasistoj tuj ĉesis pafi sciurojn, eĉ zibelojn, kaj ekpeladis nure tiun vulpon.

La nigra felo estas videbla sur la neĝo de malproksime. La nigra vulpo devas esti tre ruza kaj sagaca por savi sian felon. Kaj ĝi estis tiom ruza, ke allasis neniun al si je pafdistanco kaj trafis en nenian kaptilon.

Poiome ĉiuj ĉasistoj rezignis kapti ĝin kaj denove komencis pafi sciurojn, zibelojn kaj aliajn bestojn.

Nur unu juna ĉasisto neniuokaze volis lasi ĝin trankvila. Li pensis: “Mi suferados, sed tamen kaptos ĝin”.

Kaj li daŭre peladis ĝin.

Tamen la nigra vulpo agis tiel. La ĉasisto sekvas ĝin, sed ĝi kuras ronden kaj ekiras laŭ liaj spuroj. Kaj ĝi mem sekvas lin tra la arbaro.

La juna bestkaptisto komprenis la vulpan ruzaĵon.

“Bone do, – pensis li. – Sekvu. Sed mi starigos sur la ronda vojeto kaptilojn kaj mempafilojn kaj irados laŭ tiu vojeto. Finfine vi, kara, kaptiĝos por mi”.

Tiel li faris.

Li starigis kaptilojn sur la vojeto, surŝutis ilin per neĝo, por ke ili estu nevideblaj, kaŝis mempafilojn en arbustoj, kaj sagpafajn ŝnuretojn etendis tra la vojeto.

Kaj li ekiradis laŭ la vojeto. Li iras, kaj la nigra vulpo sekvas lin.

Li transpaŝas ĉiujn ŝnuretojn kaj kaptilojn, kaj la nigra vulpo transsaltas ilin.

Rondiris-rondiris, rondiris-rondiris li – la ĉasisto laciĝis, pene sin tiras. Kaj jen li tuŝis unu ŝnureton.

La mempafilo ekpafis, kaj la sago trafis lian gambon. Li apenaŭ hejmen finrampis. Kaj poste tutvintre li kuŝadis malsana en lito.

Kaj la nigra vulpo do foriris.

esperantigis Tatjana Kuzjmina (Uljanovsk)

BLUA BESTETO

En densa arbaro sur monto estis mallume kiel sub tegmento. Sed jen el post nubo aperis la luno kaj tuj ekradiis, ekbrilis neĝeroj sur branĉoj, sur abioj, sur pinoj, kaj arĝentis glata trunko de aĝa tremolo. Ĉe altaĵo ĝia nigris truo-kaverneto.

---

[1] E-tradukoj de tri aliaj rakontoj de V.Bianki aperis en REGo № 4 (59), 2010, p. 46.

Jen laŭ neĝo per delikataj, neaŭdeblaj saltoj proksimiĝis al la tremolo malhelfela longa besteto. Ĝi haltis, ekflaris, levis supren la akutan kapeton. La supra lipo moviĝis iom supren, kaj ekvideblis akraj rabaj dentoj.

Tio estas mustelo – mortiganto de ĉiuj etaj arbaraj bestoj. Kaj jen ĝi, apenaŭ susurante per ungoj, jam kuras supren laŭ la tremolo.

Supre el la kaverneto eliĝis liphara ronda kapeto. Post momento la blua besteto jam kuris laŭ branĉo deŝutante neĝon samtempe kaj facile saltis sur branĉon de apuda pino.

Kvankam la salto estis tute senpeza, tamen la branĉo ekbalanciĝis, la mustelo rimarkis. Ĝi kurbiĝis kvazaŭ streĉita pafarko, poste rektiĝis kaj transsaltis fluge sur la ankoraŭ ŝanceliĝantan branĉon. La mustelo fulmrapide supreniĝis laŭ la pino por atingi la besteton.

Neniu estas en arbaro pli vigla ol la mustelo. De ĝi ne povas sin savi eĉ sciuro.

La blua besteto aŭdas post si persekuton, tamen ĝi ne havas tempon rigardi malantaŭen, necesas rapide, rapide sin savi. De sur la pino ĝi saltis abion.

Vane la besteto artifikas, kuras laŭ alia flanko de la abio, la mustelo danĝere postsekvas. La besteto atingis randon de abia branĉo, sed la mustelo jam apudas, dentoklakis! Tamen la besteto sukcesis forsalti.

De arbo sur arbon kuregis la blua besteto kaj la mustelo, kvazaŭ du birdoj inter densaj branĉoj.

Saltas la blua besteto, kliniĝas branĉo, la mustelo postas, eĉ momenton ne donas por ripozo.

Kaj jen jam elĉerpiĝis fortoj de la blua besteto, jam apenaŭ tenas ĝin la piedetoj, ĝi jen saltis, sed maltrafis la branĉon – falas malsupren. Ne, ĝi ne falis, sed dum la falado sukcesis kroĉiĝi al malsupra branĉo kaj – antaŭen, antaŭen per la lastaj fortoj.

Tamen la mustelo kuras jam laŭsupre kaj de tie projektas kiel estas pli oportune ĵeti sin malsupren kaj kapti.

Kaj jen por unu momento la blua besteto haltis: la arbon sekvis abismo. La saltanta mustelo tuje haltis super la besteto kaj neatendite sin ĵetis malsupren.

Ĝia salto estis precize mezurita. Ĝi per ĉiuj siaj kvar piedoj falis sur la lokon, kie ĵus haltis la blua besteto, sed tiu jam saltis rekte la aeron kaj ekflugis malrapide, kaj libere ŝvebis en la aero super la abismo, kvazaŭ sonĝe. Tamen ĉio okazis reale, sub la hela luno.

Tiu estis flugsciuro, inter ĝiaj antaŭaj kaj malantaŭaj piedetoj streĉiĝis libera haŭto, kiu kvazaŭ paraŝuteto tenis ĝin en la aero.

La mustelo ne postsaltis, ĝi ja ne kapablas flugi, ĝi falus en la abismon.

La fluganta sciuro turnis la voston kaj bele rondigis sian flugon, malsupreniĝis sur abion starantan sur la alia flanko de la abismo.

La mustelo malice dentoklakis pro kolero kaj komencis malsupreniĝi de sur la arbo. La blua besteto savis sin, restis vivi.

esperantigis membroj de Peterburga klubo "Espero"
(Tatjana Artemjeva, Valentina Ĥoreva, Natalja Skaruk, Ljudmila Poloĵenskaja, Vladimir Budrin, Jekaterina Maliŝeva, Tatjana Pautova, Valeria Cvetkova)

KIU PER KIO KANTAS?

Ĉu vi aŭdas, kia muziko tondras en arbaro?

Aŭskultante ĝin, eblas pensi, ke ĉiuj bestoj, birdoj kaj insektoj naskiĝis en la mondo kiel kantistoj kaj muzikistoj.

Eble, tio estas ĝusta: muzikon ja ĉiuj ŝatas, kaj kanti ĉiuj deziras. Tamen ne ĉiu voĉon havas.

Jen aŭskultu, per kio kaj kiel kantas la senvoĉaj.

Ranoj ĉe lago komencis ankoraŭ nokte.

Ili plenblovis cistojn malantaŭ la oreloj, elakvigis la kapojn, la buŝojn malfermetis.

"Kŭa-a-a-a-a!" – per unu spiro eliris el ili aero.

Aŭdis ilin Cikonio el vilaĝo.

Ekĝojis ĝi:

"Plena koruso! Havos mi ion por manĝado!"

la esperantistoj en Bianki-muzeo

Kaj ĝi ekflugis al la lago por matenmanĝi, alflugis kaj sidiĝis surborde.

Ĝi sidas kaj pensas:

"Ĉu mi estas malpli bona ol ranoj? Kantas ja ili sen voĉo. Ankaŭ mi provu".

Ĝi levis la longan bekon, ekfrapadis, ekklakadis per unu beka duono kontraŭ la alia, – jen laŭte, jen mallaŭte, jen ofte, jen malofte: kvazaŭ klakilo ligna klakis – ja ĝuste! Tiel diskantas ĝi, eĉ pri sia matenmanĝo forgesis.

Kaj inter skirpoj staris Botaŭro sur unu gambo, aŭskultis kaj pensis:

"Senvoĉa mi estas ardeo! Sed ja ankaŭ Cikonio ne estas kanta birdeto, sed jen kian kanton sonludetas".

Kaj ĝi elpensis:

"Jen mi per akvo muziku!".

Ĝi enlagigis la bekon, plenigis ĝin per akvo kaj jen blovis en la bekon! Disiris laŭ la lago laŭta rumoro:

"Prumb-bu-bu-bumm!.." – kvazaŭ bovo muĝis.

"Jen kia kanto!" – pensis Pego, aŭskultante Botaŭron el arbaro. – Muzikilon do mi trovos: ĉu la arbo ne povos esti tamburo, kaj ĉu mia nazo ne povos esti bastoneto?"

Per la vosto apogis sin, malantaŭen kliniĝis, eksvingis la kapon – jen ekĉizis per nazo branĉon!

Ĝuste – tamburfrapado.

Ekgrimpis el sub kortiko Skarabo kun longegaj lipharoj.

Ekturnadis ĝi sian kapon, knaradis ĝia malmola kolo – akuta fajfeto aŭdiĝis.

Fajfadas la lipharulo, sed vane; neniu aŭdas. Penigis ĝi sian kolon – tamen ĝi mem kontentas pri sia kanto.

Kaj malsupre, sub la arbo, el nesto elŝovis sin Burdo kaj flugis al herbejo por kanti.

Ĉirkaŭ floro en la herbejo ĝi giras, zumas per nervuroplenaj malmolaj flugiletoj, kvazaŭ kordo sonoras.

Vekis burda kanto verdan Akridon en herbo.

Komencis Akrido agordi siajn violonetojn. La violonetoj troviĝas sur flugiletoj, kaj anstataŭ arĉoj – longaj arieraj piedetoj kun genuoj malantaŭe. Sur flugiloj estas breĉetoj, kaj sur la gambetoj – kroĉiletoj.

Frotas Akrido per la gambetoj flankojn, breĉetojn per la kroĉiletoj tuŝadas – ĝi ĉirpas.

Akridoj sur la herbejo estas multaj: plena korda orkestro.

“Eh, – pensas longnaza Skolopo sub malplateto, – ankaŭ mi devas kanti! Tamen per kio? Gorĝo mia ne taŭgas, nazo mia ne taŭgas, la kolo ne taŭgas, la flugiletoj ne taŭgas, la piedetoj ne taŭgas... Eh! Ĉu estu, ĉu ne estu, – jen mi flugu, ne silentu, per io ekkriu!”

Elsaltis el-sub malplateto, supren pafis sin, flugis rekten ĝis nuboj.

Ĝi la voston malfermis kiel ventumilon, rektigis la flugiletojn, turnis la nazon al la tero kaj ĵetis sin malsupren, turnante sin de flanko al flanko, kiel ĵetita de altaĵo tabuleto.

La kapo la aeron disŝiras, kaj en la vosto maldikajn malvastajn plumetojn vento plukas.

Kaj oni aŭdas sur la tero: kvazaŭ en alto ŝafeto ekkantis, ekblekis.

Sed tiu estas Skolopo.

Divenu, per kio ĝi kantas?

Per la vosto.

esperantigis membroj de Uljanovska Esperanto-klubo
(Jelena Tubalec, Oljga Terentjeva, Sergej Abramov,
Aleksandr Bikov, Jurij Karcev)

KIES BEKO ESTAS PLI PERFEKTA?

Muŝkaptisto-Subtilbekulo sidis sur branĉo kaj ĉirkaŭrigardis. Kiam aperas muŝo aŭ papilio, ĝi tuj ekflugas, kaptas ĝin kaj englutas. Poste ĝi denove sidas sur branĉo kaj atendas, esploras. Foje ekvidis ĝi apude birdon – Kverkbekulon kaj komencis lamenti pri sia amara sorto.

– Min – ĝi diras – tre lacigas akiri manĝaĵon. Dum tuta tago mi laboras, laboras, nek sonĝon, nek ripozon havas. Sed tutegale mi vivas malsata. Imagu: kiom da kuletoj necesas kapti por esti sata! Sed grajnojn beki mi ne povas – beko mia estas tro malforta.

– Jes, via beko por nenio taŭgas – diris Kverkbekulo – malfortetan bekon vi havas. Jen la mia estas alia! Per mia beko ĉerizan kernon samkiel ovan ŝeleton

dismordas. Sidadas mi surloke, bekadas berojn kaj krevigas. Krak! – kaj prete! Krak! – kaj prete. Se havus vi la saman bekon...

Ekaŭdis ĝin Loksio-Krucbekulo kaj diras:

– Vi havas, Kverkbekulo, absolute simplan bekon, same kiel Pasero, sed iomete pli dikan. Jen, rigardu, kia krucforma estas mia beko. Mi per tia beko dum tuta jaro semojn el strobiloj elŝeligas. Jen, tiamaniere.

Krucbekulo lerte prenis per kurbobeko skvameton de abia strobilo kaj elmetis semon.

– Ĝuste, – diris Muŝkaptisto – via beko pli ruza estas.

– Nenion vi komprenas pri bekoj! – raŭke parolis el marĉo Skolopo-Longbekulo. Bona beko devas esti rekta kaj longa, por skarabetojn pli oportune akiri el ŝlimo. Rigardu mian bekon!

Rigardis la birdoj suben, kaj tie el kano elstaras beko longa, kiel krajono, kaj maldika, kiel alumeto.

– Ah! – diris Muŝkaptisto – ankaŭ mi volas tian bekon!

– Atendu! – ekkriis du fratoj-kalidroj: Alenbekulo kaj Numenio-Serpobekulo. – Vi ankoraŭ ne vidis niajn bekojn!

Kaj ekvidis Muŝkaptisto antaŭ si du bonegajn bekojn: unu estas direktita supren, la dua – male, malsupren, kaj ambaŭ estas maldikaj kiel aleno.

– Mia beko estas levita supren – diris Alenbekulo – por en akvo diversajn faŭnerojn kapti.

– Kaj mia beko estas mallevita – diris Numenio-Serpobekulo – por vermojn el herbaro per ĝi treni.

– Nu, – diris Muŝkaptisto, – pli bonajn bekoj ol viaj ne eblas imagi!

– Verŝajne, vi verajn bekojn neniam vidis! – ekkvakis el flako Larĝbekulo. – Rigardu, kiaj veraj bekoj ekzistas. Jen!

Ĉiuj birdoj ekridetis: jen estas fosilo!

– Per tiu beko estas tre oportune en akvo kirli! – ofendite diris Larĝbekulo kaj rapide denove transkapiĝis en flakon. Ĉerpis ĝi plenan bekon da akvo kaj komencis tralasi tra la beko same kiel tra kombilo. La akvo elfluis, sed skarabetoj en la buŝo restis.

– Atenton al mia beketo! – eksusuris de arbo modesta griza Kaprimulgo-Retbekulo. – Mia beko estas tre malgranda, tamen servas tre bone: muŝetoj, kuloj, papilioj amase en mian faringon trafas, kiam mi nokte flugas super tero, malferminte la buŝon.

– Kiamaniere? – miris Muŝkaptisto.

– Ja jen kiamaniere – diris Kaprimulgo-Retbekulo kaj malfermaĉis buŝegon –

ĉiuj birdoj flugis for de ĝi.

– Jen, estas feliĉulo! – diris Muŝkaptisto. – Mi po unu kuleton kaptas, kaj tiu kaptas ilin po cent.

– Jes, – konsentis la birdoj, – kun tia buŝego estas bone.

– Ho vi, etulaĉoj! – kriis al ili Pelikano-Sakbekulo de lago. – Kaptis vi kuleton – kaj ĝojas, tamen en la nutroprovizo nenio estas. Jen, mi kaptis fiŝon – kaj metis en la sakon.

Levis la dika Pelikano sian bekon, kaj sub lia beko estas sako, plena de fiŝoj.

– Jen estas beko! – ekkriis Muŝkaptisto. – Ĉi tio estas nutroprovizejo! Pli oportuna eĉ ne elpenseblas.

– Vi, vere, mian bekon ankoraŭ ne vidis – diris Pego. – Jen, admiru!

– Por kiu celo mi admiru ĝin? – demandis Muŝkaptisto. – Beko kiel beko, rekta, ne tre longa, sen reto kaj sen sako. Per tia beko nek tagmanĝi, nek fari nutroprovizon eblas.

– Por ni, arbaraj laboristoj, – diris Pego-Bekpikulo, – necesas ĉiujn ilojn havi apude por ĉarpentistaj kaj lignaĵaj faroj. Per tiu beko ni ne nur nutraĵon por ni prenas el sub ŝelo, sed ankaŭ arbon bekpikas: faras kavernojn, ili estas dometoj por ni kaj por aliaj birdoj. Mia beko estas ĉizilo!

– Mirakloj! – diris Muŝkaptisto. – Mi vidis multe da bekoj hodiaŭ, sed ne povas decidi – kiu el ili estas pli bona. Ekstaru, fratetoj, unulinie. Mi rigardos vin kaj elektos la plej bonan bekon.

Ekstaris birdoj antaŭ Muŝkaptisto-Subtilbekulo: Kverkbekulo, Krucbekulo, Longbekulo, Larĝbekulo, Retbekulo, Sakbekulo kaj Bekpikulo.

Subite falis al ili de supre griza Akcipitro-Hoketbekulo, kaptis Muŝkaptiston kaj forportis ĝin al sia nesto por manĝi.

La aliaj birdoj ektimis kaj forflugis diversflanken.

esperantigis Tatjana Iljutkina (Dimitrovgrad)

Kun granda bedaŭro mi informas, ke la 23-an de decembro 2010 forpasis en Tel-Avivo (Israelo) mia kuzo Danielo Kolker – esperantisto ekde 1957, iama aktiva SEJM-ano kaj prezidanto de Esperanto-klubo en Zaporoĵje, partopreninto de multaj Esperanto-tendaroj kaj gvidinto de amasa koresponda Esperanto-kurso en Sovetunio, vicredaktoro de la gazeto *Israela Esperantisto*, dumviva membro de UEA, Esperanta poeto kaj tradukisto.

Boris Kolker (Usono)

LITERATURA KONKURSO *LIRO-2010*

La juĝkomisiono de la tradicia literatura konkurso *Liro-2010* (Aleksej Birjulin, Michel Duc Goninaz, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korĵenkov, Alen Kris, Valentin Melnikov, Petro Palivoda), organizita de *La Ondo de Esperanto*, ricevis 39 konkursaĵojn de 22 aŭtoroj el 10 landoj: Brazilo, Britio, Francio, Germanio, Kanado, Pollando, Rumanio, Ruslando, Svedio, Usono. (Pasintjare partoprenis 28 konkursaĵoj de 21 aŭtoroj el 5 landoj.)

La 15-an de januaro 2011 la juĝkomisiono anoncis la rezulton de *Liro-2010.*

Originala prozo. Laŭreato: Edmund Grimley Evans (Britio) pro *Dank' al Dio*. Laŭda mencio: Paulo Sérgio Viana (Brazilo) pro *Lirika kanto.*

Originala poezio. Laŭreato: Aleksandro Mitin (Ruslando) pro *Feliĉulo*. Laŭdaj mencioj: Grigorij Arosev (Ruslando) pro *Papilioj*; Rustam Karapetjan (Ruslando) pro *Virino staras ĉe fenestro*.

Traduko el la angla (*The man who lived for others* de Jerome K. Jerome). Laŭreato: Russ Williams (Pollando).

Traduko el la franca (*L' ami Joseph* de Guy de Maupassant). Laŭreato: Jean-Luc Tortel (Francio). Laŭda mencio: Thierry Tailhades (Francio).

Traduko el la rusa (*Американец* de Arkadij Averĉenko). Laŭreato ne estas anoncita, ĉar partoprenis nur du verkoj. Laŭda mencio: Anna kaj Mati Pentus (Ruslando).

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. Konforme al la regularo la organizantoj ĝis la 1-a de januaro 2013 havas ekskluzivan rajton publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en *La Ondo de Esperanto*, libroforme kaj elektronike.

Legu pliajn informojn pri *Liro,* ankaŭ la listojn de la pli fruaj laŭreatoj ĉe la adreso <http://esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm>.

Gratulon al la laŭreatoj! Dankon al la partoprenintoj!

Halina Gorecka, sekretario de Liro-2010

INTERNACIA ESPERANTA LITERATURA KONKURSO *"ĤRISTO GOROV – ĤRIMA"*

Ĥristo Gorov (Ĥrima) estis unu el la plej elstaraj bulgaraj esperantistoj, verkisto, poeto, tradukisto kaj publicisto. Bulgara Esperanto-Asocio anoncas Internacian Esperantan Literaturan Konkurson, kiu okazos je ĉiuj tri jaroj. En la konkurso povos partopreni verkistoj, poetoj, ĵurnalistoj el ĉiuj landoj.

La konkurso havos la jenajn branĉojn: **Poezio**; **Prozo**; **Artikolo**. Ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per du poemoj, originale verkitaj en Esperanto. La noveloj devas esti ĝis 4-paĝaj, kaj ĉiu aŭtoro rajtas partopreni per unu novelo, originale verkita en Esperanto. La artikoloj estu dediĉitaj al signifa Esperanta aranĝo. La poemoj, noveloj kaj la artikoloj devas esti komputile kompostitaj. La konkurso ne havas apartan temon. La gajnintoj ricevos premiojn.

Bonvolu sendi viajn kontribuojn ĝis la 1-a de septembro 2012 rete al <modest@abv.bg> aŭ poŝte al la adreso: *Georgi Mihalkov, Sofio – 1229, "Nadeĵda" V, bl. 529 vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario.* La rezultoj estos anoncitaj en oktobro 2012.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)

Germania turneo

Inter la 25-a de decembro 2010 kaj la 14-a de januaro 2011, invitita de GEA, mi travivis vican turneon en Germanio kun ĉiuj avantaĝoj de la turneado ĝuste en tiu ĉi lando: perfekta organizo, komforta restado, komprenema publiko... La turneo tradicie komenciĝis de IF (Internacia Festivalo) en ĉarma bavara urbeto Noerdlingen. La eventoriĉa semajno de IF meritus apartan artikolon, sed mia tempo tie, des pli poste, kuris tro rapide. Por dek tagoj de la post-IF-a turneo mi havis 9 urbojn, do, duondorme trajnumante inter la urboj mi ĉiutage nur fiksis miajn travivaĵojn per kelkaj verslinioj. Rezultiĝis taglibro, kiun mi proponas al la legantoj de REGo.

URBOJ, HOMOJ, EVENTOJ

IF-kanto

Gardas la ringo de l' mur'
pacon por ĉarma urbeto,
antaŭnovjara dormem' kaj kvieto,
kaj la abia murmur'.
Lastajn momentojn de l' jar'
bekas nun la tempobirdo,
tamen alvenas nek trist', nek sopir', do
levu la glasojn ni ĉar –

En Bavario, biere ebria
fluge rapidas semajno feria.
Trans la programo bunte varia
de januar' jam videblas la tria!
Kion ni faru?
L' tempon ne ŝparu!
Ĝuon de festa ripozo ekflaru
por tutanima fola ebrio –
en Bavario!

Plenas je steloj ĉiel',
plenas pokaloj je vino,
plenas je sentoj nun ĉies animo,
kvazaŭ ĉampana botel'.
Do sen hezit', amikar',
ni la animojn malkorku,
ŝaŭmon de l' sent' malavare alportu
al festotablo ni, ĉar –

En Bavario, biere ebria...

Kaj por disiĝa moment',
por adiaŭa malgajo
restu en koroj guteto de l' gajno –
ŝaŭmo de l' rava event'.
Triston de la kalendar'
tiu guteto ĝojigu,
en malproksimo nin plu interligu
kaj proksimigu nin, ĉar –

En Bavario, biere ebria...
24.12.10

Munkeno

Jen litra kruĉo en la mano!
Jen porka kruro sur telero!
Ŝvebigas korpon kor-elano
en bonaera atmosfero
kun gusto de l' bier' bavara,
kun voko de l' rostaĵ' vianda –
tiel destino malavara
min benas por momento franda.
30.12.10



Noerdlingen

Venis en flamo de l' morna ĉiel',
bato, la prahistoria...
En ronda kav' de iama falstel'
dormas urbet' bavaria.
Rufajn tegolojn de ĉiu tegment'
tuŝas Novjara mateno.
Laŭ olda muro de Noerdlingen
garde rondiras la tempo.
01.01.11

Al HDP

Ĉu ni elĉerpiĝas, kara?
Tro haste nin tempo lulas,
kaj la laboreg' multjara
la sanon – ve, ne stimulas.
Sed multas en mond' amikoj,
pensantaj pri mi kaj pri vi,
do emu fortiĝi ni kaj
en nia labor' plu vivi.
02.01.11

Wemding

Ĉe l' kafejo, nomata "Schlecht"[1]
staras ni kun hezito.
Ĉu malbonas manĝaĵ' sur plet',
aŭ mensogas la mito
pri la *schlecht* de l' kafejo "Schlecht".

Eble mastro kun pensa rekt',
sen rimors' kaj prokrasto
skribus "Besser"[2] anstataŭ "Schlecht"
por ke ĉiu ajn gasto
ne plu vidu la nomon "Schlecht".

Sed la mastr' de l' kafejo "Schlecht"
ludas la kontraŭdirojn,
kaj fieras pro la elekt'
de la nomo, ĉar nur admirojn
vekas manĝ' de l' kafejo "Schlecht".
03.01.11

Aspiro

Bardeca nurenberga kompani'!
L' komprenon senprobleme trovas ni
en harmoni' de l' vortoj kaj muzik',
en la volvanta kanta gramatik'.
Do ĝuste nin kunigis sorta pad'
por kuna sido, rido kaj kantad'.
04.01.11

Erlangen

Saloneto aparta
restoracia.
Kelnereto alporta,
la plago mia,
frapas la enirpordon
preskaŭ konstante,
kaŭzas bruon, malordon,
dum mi perkante
ne atingas publikon,
daŭre vaĉantan
propran nur umbilikon,

---

[1] schlecht (germ) – malbona
[2] besser (germ) – pli bona

ne l' sonon ĉantan...
Do mi finu hodiaŭ
l' aferon mian
per sincera "Adiaŭ,
por ĉiam."

05.01.11

Al Alois

Voj' al la fina venko
nun en nebul', amiko.
Mankas favora vento,
pelas amas', publiko
l' pensojn, esence helajn.
L' sorto al ni kruelajn
tagojn tro ofte donas,
ofte la viv' ne bonas
por streb', espero, kreo...
Sed iru ni. Sen veo.

06.01.11

Freiburg

Ulla fumas. Ni paŝas surmonten.
Infanaro kuregas renkonten
laŭ dekliva padeto Ŝvarcvalda.
Eble ankaŭ ni kuros tre baldaŭ
post rigardi l' urbeton de l' supro.
Akva lirlo, ŝtoneta susuro
nin ĉe lanta paŝad' akompanas.
Mi jam tiun ĉi belon ekamas,
ekŝategas kaj ekamindumas!
Nin ĉirkaŭas montar'. Ulla fumas.

07.01.11

Hazarde en Freiburg

Posedantino de rusa butiko
ege fervoras pri l' rusa muziko.
Pompas la formoj, l' manoj aplaŭdas –
ŝi min perceptas, aŭskultas kaj aŭdas!
Mi ja scivolas pri l' anatomi',
sed ŝi ne volas kanti kun mi...

07.01.11

Samvespere

Ni kunsidis ĉe Manfredo
en vendredo

kun fromaĝo kaj kun vino.
La kulmino
de l’ paroloj mondrenversaj
plej diversaj
venis post la noktomezo,
kaj la pezo
de la pensoj ne plu premis,
kaj ni emis –
ne konkludojn saĝajn formi,
sed nur dormi.

07.01.11

Schwerin

Aĥ, Laima, ho kiel vi stiras!
Samtiel la viv’ preteriras
en hasta, bombasta senlaco...
“Jen placo. Jen ĉefa palaco.
Jen lago. La dua. La deka.”
Mi gapas kun frunto malseka
por nur elbalbuti en fino:
“Mi vin ne forgesos, Ŝverino!”

08.01.11

Renkonto

Dum koncert’ en Ŝverino
gvatas min sinjorino
el la vico unua.
Loze falas harondo,
rekoneblas la blondo
kaj rigardo la blua.
Mi singulte tusetas,
stumblas kaj pardonpetas
ĉe l’ fervora kantado:
ien fuĝis ĉi haroj
antaŭ dudek sep jaroj!
Nun venigis la pado
nin al tiu renkonto –
jes, malgrandas la mondo,
do amikon mi petu
tuj min foti kun mia
ekstertempa vizio.
Mia kara, ridetu!

08.01.11

Entrajne

Ĉu vivolongo nia nana
min sopirigas?
La rememor', tutcerte, vana
nin iel ligas.
Pretervivinte duonvivon
en svaga disto,
ni tamen lasu la naivon
cedi al tristo.
Do trovu nin indiferentaj
l' renkonta horo...
Sed kial pulsas stultaj sentoj
En mia koro?

09.01.11

Dresden

Stacidomo konata.
Ankaŭ preĝejaj kupoloj.
La valizon en aŭton –
sen superfluaj paroloj,
kaj antaŭen, al celo
laŭ la inunda ebeno!
Mi ne havas nun tempon.
Do – ĝis poste, Dresdeno!

10.01.11

Saŭnado

Kvasto – l' flaŭro, mi – la faŭno,
naŭdek gradoj en la saŭno,
sed en Elbo – du!
Do mi pensas, ĉu
risku mi post av' Alberto
kuri laŭ ŝtupar' kun lerto
ĝis la akva frid'
kaj kun fola rid'
en malvarman akvon fali,
kaj denove min instali
en varmega en'
de l' ŝvitiga ben'?
Mi kuraĝas, kuras, saltas.
Pika frido, spiro haltas...
Sed ja kia rav' –
Plonĝi post la av'!

10.01.11

Berlin

Jen la tago por promeno!
Per frosteto rave pika
tiklas min berlina beno
en ĉi tiu tag' unika.
La paŝado en nebul', do
kun fumetoj ĉe elspiro
realiĝas mensa muldo
de l' vidito kaj admiro.
Kaj registras mia kapo
bildojn por la onta kreo...
Anjo, fotu min sen ĉapo
apud tiu nova ZEO!..

11.01.11

koruso de barbuloj

Incendio

Jen Anna, tre ĉarma fraŭlino,
l' akompanantin' en Berlino.

Jen mi, malĉarmul', barbulaĉo,
simila al avo aŭ paĉjo
de Anna, tre ĉarma fraŭlino,
l' akompanantin' en Berlino.

Jen ĉina knabin' – kelnerino,
bonkore servanta en sino
de l' ĉina restoracio,
do nun rakontanta pri ĉio
al mi, malĉarmul' barbulaĉo,
simila al avo aŭ paĉjo
de Anna, tre ĉarma fraŭlino,
l' akompanantin' en Berlino.

Jen pladoj, ne ĉinaj, sed tajaj,
vokantaj al pensoj plej gajaj,
kun ĉina knabin' – kelnerino,
bonkore servanta en sino
de l' ĉina restoracio,
ĉar belas l' aspekt' super ĉio
por mi, malĉarmul', barbulaĉo,
simila al avo aŭ paĉjo
de Anna, tre ĉarma fraŭlino,
l' akompanantin' en Berlino.

Jen la incendio, brulanta

en buŝo, kun hasto tre vanta,
manĝinta el pladoj, la tajaj,
vokantaj al pensoj plej gajaj
kun ĉina knabin'– kelnerino,
bonkore servanta en sino
de l' ĉina restoracio,
spicitaj, en ver', super ĉio
por mi, la stultul', barbulaĉo,
simila al avo aŭ paĉjo
de Anna, tre ĉarma fraŭlino,
l' akompanantin' en Berlino.

Stertore mi vokas kelneron
kaj verŝas abunde bieron
al la incendio, brulanta
en buŝo, kun hasto tre vanta,
manĝinta el pladoj, la tajaj,
vokantaj al pensoj plej gajaj
kun ĉina knabin'– kelnerino,
bonkore servanta en sino
de l' ĉina restoracio,
spicitaj, en ver', super ĉio
por mi, la stultul', barbulaĉo,
simila al avo aŭ paĉjo
de Anna, tre ĉarma fraŭlino,
l' akompanantin' en Berlino.

Aĥ, Anna, ne vi, sed stertoro
fiksiĝos en mia memoro...
11.01.2011

Vespera "legado"

Denaska esperantisto
kun luksa "biblioteko".
Do tuj malaperas tristo,
kaj tuj komenciĝas "lego".
Hodiaŭ ni legu nuran
"klasikan literaturon":
Jen "Blanka ĉeval'" usona.
Jen "Hennesy" – ankaŭ bona.
Kaj jen la plej legivoka
en nigra bindaĵ' "John Walker"...
Mi riskas iom oponi:
– Ĉu scias la mastr', ke oni
nun legas ne la usonajn,

sed verkojn irlandajn – pli bonajn?
– Respondas la mastr': – Ĉu vero?
Ja estas de l' gust' afero... –
Kaj portas kun fajfa son'
La libron de "Jameson".
Post horo, viglege glita,
Ĝi estas jam finlegita.
La mastro novaĵon bonan
Ĉe l' fina paĝo prezentas:
– Mi havas la duan eldonon!
Ni legu. Ĉu vi konsentas?

11.01.11

Herzberg

Esperanto-centro.
La gastlibro plenas.
La venantoj, certe,
tiun urbon benas,
ĉar abundas ŝildoj,
flirtas verdaj flagoj –
jen fotindaj bildoj,
kaj glorindaj agoj.
Zamenhof granita
kun okuloj tristaj.
La urbet' benita.
Kvin esperantistoj.

12.01.11

Krefeld

Veno. Tusad'. Butikaro.
Samlandanino. Malŝparo
en aĉetado plej hasta,
ĉar, evidente, la lasta.
Dura fromaĝ'. "Jägermejster".[1]
Mi ne kapablas komerce
pensi ĉe ĉiu aĉeto!
Estu truet' en buĝeto,
tamen mi agu kun certo
antaŭ la lasta koncerto.

13.01.11

Al Ebel-familio

Saluton, Volodja kaj Rosa,

[1] loka alkoholaĵo

fidelaj amikoj!
Forflugis la tempo mo-
josa
en urbaj butikoj.
Forglitis l' inspiro kon-
certa
kaj kuna kantado.
Kandeloj degelis, kaj
certa
nur hor' por sidado
ĉetable kun vodko miela,
kun la rememoroj
pri l' juno, kandele de-
gela,
la tagoj, la horoj
de nia SEJM-eca fortuno,
kaptita bontrove...
Ni kunas, kaj nin nia juno
varmigas denove.

14.01.11

PRI KANTO DE M.POVORIN "SKARABO SUR SABLO"

Bona estas tiu knabo.
Li kuŝante ĉe skarabo
Pri l' etulo verkis belon.
Bardo povis bagatelon
Tuj transformi en juvelon
Fajnan, ĉarman, elegantan,
Poezian, versan, kantan.
Mi najbaras seĝon, tablon,
Li – skarabon, sunon, sablon.
Li najbaras romantikon,
Feliĉigas la amikon
Per lirika malavaro
Ĉe la maro en tendaro.
Min turmentas splena muto
Sed en fora Tarĥankuto
Trilas kante Mikaelo
Pri krimea varma belo.

Nikolaj Neĉajev (Irkutsk)



E-vivo en Krasnodara regiono reaktiviĝis. La krasnodaraj esperantistoj salutas ĉiujn konatojn kaj konotojn kaj invitas al RET-2011 (vidu la informojn en la p. 1)

JUBILEAJ DATOJ DE LA JARO 2011

Vladimir Majnov (1871-1942) – 140 jaroj
Ilja Izgur (1881-1937) – 130 jaroj
Ivan Lidin (Moĥov) (1891-?) – 120 jaroj
Efim Spiridoviĉ (1891-1935) – 120 jaroj
Aleksandr Erjuĥin (1901-1959) – 110 jaroj
Isaak Ĥoves (1901-1968) – 110 jaroj
SEU – 90 jaroj
IAREV – 75 jaroj

Zamenhof-forma nano en la ĝardeno (la foto de Serge Sire (Francio), sendita por la Zamenhof-taga konkurso en Jekaterinburg)

09.01 – ***Aleksandr Titajev*** – 60 jaroj
14.01 – ***Sergej Rublov*** (1901-1978) – 110 jaroj
14.01 – ***Klara Ilutoviĉ*** – 65 jaroj
18.01 – ***Konstantin Gusev*** (1916-1980) – 95 jaroj
21.01 – ***Aleksandr Osincev*** – 25 jaroj
29.01 – ***Vera Zlotnikova*** – 80 jaroj
30.01 – ***Nikolaj Hohlov*** (1891-1953) – 120 jaroj
03.02 – ***Sergej Obruĉev*** (1891-1965) – 120 jaroj
05.02 – ***Vjaĉeslav Roĵdestvenskij*** – 70 jaroj
11.02 – ***Semjon Podkaminer*** (1901-1982) – 110 jaroj
16.02 – ***Pavel Moĵajev*** – 30 jaroj
23.02 – ***Georgo Deŝkin*** (1891-1967) – 120 jaroj
01.03 – ***Oleg Ciganov*** – 50 jaroj
02.03 – ***Aleksej Ĵuravljov*** – 55 jaroj
07.03 – ***Sergej Straŝnenko*** – 55 jaroj
09.03 – ***Viktor Aroloviĉ*** – 65 jaroj
30.03 – ***Semjon Vajnblat*** – 75 jaroj
02.04 – ***Boris Zozulja*** – 70 jaroj
12.04 – ***Galina Belenjuk*** – 75 jaroj
12.04 – ***Gennadij Ŝilo*** – 70 jaroj
25.04 – ***Miĥail Ĉertilov*** – 50 jaroj
10.05 – ***Antonina Bokarjova*** – 65 jaroj
19.05 – ***Vladimir Korĉagin*** – 80 jaroj
04.06 – ***Aleksandr Koteljnikov*** – 55 jaroj
29.06 – ***Nikolaj Terentjev*** – 55 jaroj
28.07 – ***Valerija Cvetkova*** – 75 jaroj
29.07 – ***Dmitrij Cibulevskij*** – 65 jaroj
02.08 – ***Sergej Bozin*** (1956-2006) – 55 jaroj

Gennadij Ŝilo kaj Viktoro Aroloviĉ

08.08 – ***Aleksandr Melnikov*** – 60 jaroj
08.08 – ***Vladimir Sapoĵnikov*** – 60 jaroj
14.08 – ***Valentin Seguru*** – 55 jaroj
18.08 – ***Alexander Shlafer*** – 55 jaroj
20.09 – ***Ivan Naumov*** – 40 jaroj
20.09 – ***Jelena Melnikova*** – 30 jaroj
28.09 – ***Miĥail Paŝĉenko*** (1901-1994) – 110 jaroj
09.10 – ***Leonid Borisov*** (1946-2008) – 65 jaroj
18.10 – ***Dina Lukjanec*** – 65 jaroj
23.10 – ***Gennadij Basov*** – 55 jaroj
29.10 – ***Pavel Korotenko*** – 40 jaroj
10.11 – ***Irina Gonĉarova*** – 60 jaroj
11.11 – ***Svetlana Gonĉarova*** – 30 jaroj
07.12 – ***Aron Zisman*** (1911 - ?) – 100 jaroj
26.12 – ***Dmitrij Perevalov*** (1951-2003) – 60 jaroj
28.12 – ***Margarita Karceva*** – 65 jaroj
28.12 – ***REU*** (fondo surbaze de SEU) – 20 jaroj
30.12 – ***Vladislav Zibenkes*** - 70 jaroj

Mikaelo Certilov

partoprenantoj de la Zamenhof-festo en Jekaterinburg, inter kiuj eblas vidi la ĉi-jarajn jubileulojn Nikolaj Terentjev kaj Aleksandr Osincev